

# ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

**Sukcesa Esperanto-Kurso en Tel-Avivo**



**Novelo: Lidja Zamenhof renkontas Itamar Ben-Yehuda**

**La 18-a IK en la okuloj de bardo Mikaelo Bronŝtejn**

**Inaŭguro: la nova tabulo "Patro Nia" en Jerusalemo**



<i>Redaktoro</i>	<i>Provlegantoj</i>	<i>ELI-Prezidanto</i>	<i>Redakcia adreso</i>
Amri Wandel	Gabi Zeevi Eldad Salzman	Amri Wandel	P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo <a href="mailto:eli@esperanto.org.il">eli@esperanto.org.il</a>



*Karaj legantoj*, Tiu ĉi pli-ol-duobla numero, estas la lasta bulteno de Israela Esperantisto kiun vi ricevos sub mia redakto. De 2008 mi redaktis dekok numerojn kaj du ekster-seriajn numerojn (la memorlibrojn pri Esti kaj Josi). Ĉi foje vi trovos

movade – diversajn informojn kaj artikolojn pri nia E-agado dum la pasinta jaro (Israela Kongreso en Aŝkelono, E-kurso en Tel-Avivo kaj pĵaj), kaj literature – premiitan novelon pri Lidja Zamenhof kaj Itamar Ben-Yehuda, daŭrigon de la artikolo de M. Bronŝtejn pri la judaj poetoj en Rusio kaj multe pli. Agrablan legadon, *Amri*

**Retejo:** <http://esperanto.org.il/ie.html>  
Fondita 1959 kiel *Nia Ligilo*

**Enpaĝigo:** A. Wandel  
**Fotoj:** A. Wandel, krom en la artikolo de *Jael Ŝelaĥ*

**Kovrilo:** E-kurso en Tel-Avivo (p.5) kaj Patro Nia (p. 17).

Abontarifo eksterlanda:  
10 EUR. Eblas pagi per UEA-konto *elia-q* aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

ISSN-1565 3315

## Enhavo

- 3 Esperanto-agado en Israelo dum 2017 en bildoj.....*A. Wandel*  
5 Sukcesa Esperanto-kurso en Tel-Avivo.....*A. Wandel*  
9 Dankon, Israelo! La 18-a Israela Kongreso ..... *Mikaelo Bronŝtejn*  
13 Viva 18-a Israela Kongreso apud kvar maroj.....*A. Wandel*  
17 Restaŭro de la panelo Patro Nia en Jerusalemo..... *Yehuda Miklaf*  
19 Spertoj de la Itala Kongreso.....*Jael Ŝelaĥ*  
21 Lidja Zamenhof – Varsovio, Treblinka, Jad Vaŝem (hebree).....*A. Wandel*  
23 Itamar kaj Lidja, Vintra Renkontiĝo.....*Jonathan Mizrahi*  
34 Rusaj poetoj – *Parto II*..... *Mikaelo Bronŝtejn*  
43 Hebreismo kaj Esperanto.....*Davide Astori*  
51 Persona Angulo .....*Mikaelo Lineckij*  
54 Ni funebras: M.Giŝpling, A.Kerbel, L.Elaŝvili.....*J. Tilleman*

# Esperanto-agado en Israelo dum 2017

A.Wandel

## Aprilo

Kvindek personoj partoprenis la 18-an Israelan Kongreson en Aŝkelono, sep eksterlandanoj, de Rusio, Usono, Germanio, Latvio kaj Litovio. Koncertis Edgar de Asorti. Kiel kutime okazis antaŭ-kaj post-kongresaj ekskursoj por la eksterlandanoj. Vidu p. 9-16.



En la Holokaŭst-memor-ceremonio en Yad Vashem metis la tradician florkronon nome de UEA kaj ELI Gabi Zeevi, Malka Zemeli kaj Amri Wandel. Klare aŭdeblis la invito por la florkrono, en Esperanto, same kiel en tiu ĉi video de 2018:

[www.youtube.com/watch?v=Cfu4nJkaefs](http://www.youtube.com/watch?v=Cfu4nJkaefs)

**Junio** Esperanto-budo funkciis dum 5 tagoj de la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo. La Foiro okazas ĉiun duan jaron, kaj jam de 12 jaroj ELI luas budon por E-libroj. Centoj da personoj ricevis flugfoliojn kaj pluraj aĉetis librojn.



**Junio** Estis inaŭgurita la renovigita E-tabulo en la preĝejo Patro Nia, en la Oliva Monto, Jerusalemo. Vidu paĝon 17.



**Julio** Nur du israelanoj partoprenis en la 102-a Universala Kongreso en Seulo. Amri salutis nome de Israelo kaj invitis al la Israelaj Kongresoj en 2018 kaj 2019. Furoris en la Libro servo la memorlibro pri Josi Ŝemer.

**Aŭgusto** pli ol 30 s-anoj ĉeestis en la tradicia SOmer-FIna kunveno (SOFI) en la kafejo "Kafe-Kafe". Oni aŭdis pri la UK en Seulo, aĉetis la novan T-ĉemizon de la Zamenhof-Jaro, sed ĉefe babilis en bona etoso kun bona gustumado.



Post plurjara paŭzo, la 31.8n rekomenciĝis la kunvenoj de la Jerusalema Grupo, organizitaj de Laurin Lewis. La unua kunveno okazis en lia hejmo, kaj partoprenis i.a. nia dumviva membro Kiti Zicherman. La

sekvaj kunvenoj okazis la lastan ĵaŭdon ĉiu monate en la nova klubejo (la Ortodoksa Centro, Keren Hajesod 22).

**Septembro** Post plurjara paŭzo la estraro decidis reokazigi E-kurson en Tel-Avivo, kiun instruu Doron Modan. Vidu paĝon 6.

**Oktobero** S-ino Ans Bakker el Nederlando ricevis en la tel-aviva klubo ateston pri honora membreco en ELI. S-ino Bakker ankaŭ vizitis la renovigitan Jerusaleman Grupon.



Vizitis la klubon ankaŭ Prof. So Gilsu el Koreio, kiel parto de sia trimonata esplorvojaĝo pri la antikva simbolo svastiko. Li prelegis pri Koreio. Liaj spertoj en Israelo aperas en interesa bilda blogo, en E-o kaj en la Korea: <https://blog.naver.com/sokoguryo/221208020941>

**Decembro** 35 s-anoj kolektiĝis en granda salono apud la tel-aviva klubo. Estis riĉa arta programo kun muziko (Doron), kantado (Enrica, Ŝoŝia kaj David), kaj eŭritmia dancado (Tali). En la parola parto Mikaelo Lineckij prelegis pri la komenco de Esperanto, kaj (hebrelingve) Amir Naor pri la interna ideo de E-o kaj Eran pri sia nova lerneja E-kurso "Nitsotsot". Amri raportis per bilda prezentaĵo pri la jara agado de ELI kaj okazis elektoj por nova estraro.



# Sukcesa Esperanto-kurso en Tel-Avivo

A.Wandel

*Aperis en majo 2018 en la revuoj Esperanto kaj Int. Pedagogia Rev.*

*Multaj opinias, ke jam pasis la epoko de klasaj kursoj, ke nuntempe oni lernas E-on ĉefe rete, per kursoj kiel Duolingo kaj Lernu! aŭ aŭtodidakte. Efektive ankaŭ E-Ligo en Israelo (ELI) tiel opiniis, pro la daŭra malpliigo de lernantoj en ĝiaj E-kursoj en la lastaj jaroj. Lastatempe, post plurjara paŭzo, ELI decidis, eventuale lastfoje, reprovi klasan kurson. Estis decidita senprecedenca buĝeto por reklami la kurson. La reklamkampanjo rikoltis multe pli da lernantoj ol prognosis eĉ la plej optimismaj taksoj.*



La reklamado okazis en tri kanaloj: strat-afiŝoj, Facebook, kaj la gazetanonco. Oni pendigis ĉ. mil grandajn afiŝojn sur publikajn tabulojn en Tel-Avivo kaj apudurboj. En Facebook mi afiŝis pagitan reklamon por specifa celgrupo: loĝantoj en aŭ najbare de Tel-Avivo, interesiĝintaj pri temoj kiel planlingvoj, internacia komunikado kaj, kompreneble, Esperanto. Laŭ la raporto liverita de Facebook, ene de unu semajno tiu

aŝiŝo estis vidita de ĉ. 5500 personoj (vidu foton), sed nur ĉ. 1% aktive reagis (ekzemple per "ŝato").

Por la gazetara kanalo estis elektita "Haaretz", la tria plej legata gazeto en Israelo, kiu tamen estas la plej populara inter kulturemaj kleraj personoj. ELI mendis duonpaĝan anoncon en ĝia semajnfina kultura magazino "Galeria", kiu kostis ĉ. 1000 eŭrojn, sed evidentiĝis kiel bonega investo.

Ni sondis inter la kursanoj, per kiu reklam-kanalo ili eksciis pri la kurso, kaj evidentiĝis ke preskaŭ ĉiuj alvenis pro la anonco en "Haaretz". Kvankam multekosta, tiu anonco alportis pli ol dudek kursanojn, kies kotizoj estas pli ol duoble la kosto de la anonco. Kelkaj pliaj venis pro personaj kontaktoj aŭ informitoj de antaŭaj jaroj. Malpli ol 10% venis pro la stratafiŝoj (kiuj kostis pli ol la anonco) kaj 10% pro la reklamo en Facebook (kiu kostis nur 120 eŭrojn). Tiuj informoj estas ege valoraj por plani estontajn reklamkampanjojn.

Ĉiuj reklamoj invitis informiĝi pri la kurso telefone aŭ rete. La

informpetintojn zorge traktis nia s-ano Amir Naor, kiu pacience respondis, invitis, kaj konvinkis. Entute registriĝis ĉ. 40 personoj en ĉiuj aĝoj – la plej junaj estas lernejoj, la plej aĝaj – delonge pensiuloj.

Por la kurso-inaŭguro alvenis 36 personoj, kaj pliaj promesis veni en la posta semajno. La ĉambro estis plenplena. La sperta instruisto, d-ro Doron Modan, estis surprizita kaj ekscitita pro tiu neatendite granda nombro. Malgraŭ la manko de spaco, la unua leciono okazis en bona kaj trankvila etoso, la lernantoj progresis rapide kaj interesiĝis pri la sekvo.

קורס ללימוד  
**ESPERANTO**  
השפה הבין - לאומית

האגודה לאספרנטו בישראל  
מודיעה על פתיחת קורס בן 15 שיעורים ללימוד אספרנטו

הקורס יתקיים בתל-אביב  
ביום בי בשעה 19:30 החל מ - 12/03/18  
מחיר: 400 שקל לכל הקורס  
במקרה הצורך ניתן להצטרף החל מהשיעור השני/שלישי (בתאום מראש)  
חנייה חינם למשתתפי הקורס

**בואו ללמוד  
את השפה הקלה ביותר בעולם!**

סמה של השפה בא המילה "תקווה" (espero) - התקווה שיגיע יום שבו חוף מהשפת הלאומית תתקיים גם שפה משותפת שבה יוכלו לדבר בני כל העמים אלו עם אלו

את השפה המציא ד"ר אליעזר זמנהוף לפני 131 שנה (1887), וגם כיום התקווה שלו עוד הומה בלבבות רבים: מאות אלפי בני אדם מעשרות מדינות נפגשים ומדברים על כל נושא, כתבים, שרים, מדליים ילדים וכמובן שנולדים באינטרנט - באספרנטו.

לימוד אספרנטו קל יותר מלימוד כל שפה אחרת.

★  
השפה הכי קלה  
ועם זאת הכי עשירה

★  
גשר לשוני פעיל בין מאות אלפי דוברים  
מעשרות מדינות

★  
מפגשים בין תרבויות ואירוח  
ברחבי העולם



verkoj.com/kurso

פרטים והרשמה: 052-3605716  
לפרטים לגבי מפגשי הקבוצה הירושלמית: 054-4548712

En la dua leciono, la nombro de lernantoj stabiliĝis je 32. La ceteraj decidis atendi ĝis la venonta kurso. Tiu nombro estas pli-malpli la maksimuma kapacito de nia kluba saloneto. Efektive, pro la manko de spaco ne ĉiuj povis sidi ĉe tabloj, la lernantoj sen tabloj ricevis personajn skribtabuletojn (vidu foton). Entute okazos 15 lecionoj ĝis julio.



En la dua leciono mi salutis la lernantojn nome de ELI, informante ke Esperanto estas pli ol lingvo: socia fenomeno, movado, ideo, kaj praktika maniero por vojaĝi tutmonde kaj renkonti aliajn personojn sen lingvaj baroj, kiel apenaŭ eblas per etnolingvoj. Mi invitis ilin sperti tiun etoson vizitante la klubkunvenojn, kiuj okazas samloke, tuj antaŭ la lecionoj. Sekve, mi sugestis, ili povos gustumi internacian etoson en la Israela Kongreso, kaj eĉ pli sperti la E-socion kaj kulturon en la Universala Kongreso. Mi rakontis ke jam 45 jarojn mi partoprenas la UK-on preskaŭ ĉiujare, kaj sekve kelkaj el la lernantoj jam interesiĝis pri Lisbono...

Nu, eble ne estas la Fina Venko, sed ŝajne mejloŝtono por E-o en Israelo, kaj eble ankaŭ alilande. Montriĝis ke per taŭga reklamado kaj personaj kontakto kaj instruado eblas okazigi allogan klasan kurson ankaŭ en la interreta epoko. Longjara sperto montras, ke post la kurso restas en kontakto kun Esperantujo malpli ol 10% de la lernantoj. Laŭ la entuziasmo en la nuna kurso, ŝajnas ke ĉi foje la procentaĵo estos pli alta. Eble eĉ multe pli. Espereble montriĝos, ke tiuspeca persona reklamado kaj instruado povas havi bonajn rezultojn, kaj el la vidpunkto de movada daŭripovo, eble eĉ pli bonaj ol instruado per la interretaj amaskursoj. Tio dependas de la homa faktoro, ne nur de la instruisto sed de la membroj. Se ni scipovos teni la varman bonvenigan etoson, la lernantoj eble vidos, ke E-o estas pli ol lingvo, kaj pluraj el ili gustumos kaj restos en Esperantujo.



# Dankon, Israelo!

## Impresoj de la 18-a Israela Kongreso

**Mikaelo Bronŝtejn, Rusio**

---

Frosta finmarta frumateno estis en Sankt-Peterburgo. Sed en la varma ejo de la flughaveno Pulkovo ducent lokanoj, flugontaj al Tel-Avivo, kuraĝe pakis siajn jakojn, skarpojn kaj ĉapojn en la valizojn. Mi agis same, antaŭĝuante agrablan aliĝon de la vetero post kvinhora flugo. Nu, evidentiĝis, ke la aliĝo estis agrabla eĉ super mia antaŭĝuo. Ĉar, post la rusaj tri gradoj da frostoj, la telavivaj dudek kvin super nulo estis admirindaj.

Dufoje mi estis vizitinta Israelon antaŭe, sed neniam – en tiom frua printempo, do la bruska klimatsanĝo efektive ŝokis min agrable. Eĉ pli min ĝojigis la lulantaj ondoj de la Mediteranea maro kun dekokgrada varmo de la akvo, tute bona por ke la nordanoj (mi kaj Edgar el Asorti) naĝu kun plezuro. Ni naĝadis duope, ĉar la israelanoj opinias tian akvon malvarma. Do, unue, mi danku vin, Israelo, por la ĉarma vetero.


Tamen ja mi venis ne por naĝi. Post taga gastado en la hejmo de mia amiko kaj kolego (ni kune laboris en Vorkuta) mi aliĝis al la grupo de esperantistoj, trajnirantaj al Aŝkelon. Ĝuste tiu



ĉi antikva havenurbo akceptis ĉi-jare vican kongreson de ELI. Mi opinias, ke, malgraŭ ne tro amasa partoprenantaro, la aranĝo meritas la nomon “kongreso” – almenaŭ pro la riĉa programo.

Ankaŭ pro certa internacieco; la kongreson partoprenis ne nur la israelanoj, sed ankaŭ esperantistoj el Germanio, Litovio, Latvio, Rusio.

Por la gastoj estis organizitaj apartaj ekskursoj: la antaŭkongresa – al Eilat, Jordanio, Morta maro, kaj la postkongresa, kiun mi partoprenis, do poste mi atentu ĝin. Dume endas diri, ke la prelegoj estis atentokaptaj kaj riĉenhavaj, ke la ekskursoj al la prahistoriaj lokoj de Aŝkelon, altnivele gvidataj de la sperta ĉiĉerono Amri, estis tre interesaj, ke la koncertaj programoj, kie estis ankaŭ mia enspezo, estis akceptitaj kun varma aplaŭdado, ke la hotelo Leonardo provizis vere luksan loĝadon kaj bongustegajn manĝaĵojn, ke... Multas tiuj “ke”, do mi resumu: dankon, Israelo, dankon, la organizantoj! Ju pli bongusta estas kuko, des pli rapide ĝi finiĝas. La kongresaj tagoj forvaporigis, kiel unu vivmomento. Post la fermo kvarpersona internacia teamo direktis sin al Ĥajfo por la postkongresa ekskurso. Vespere ni atingis nian hotelon, kaj la ekskurso, gvidata de la ĉionscia Jehoŝua, komenciĝis nur sekvamatene. Dekomence nin akompanis pluveto – ho jes, foje pluvas ankaŭ en Israelo, sed tiu pluveto estis milda kaj agrabla. Ĝi restadis kun ni ĝis la belegaj grotoj de Roŝ-ha-Nikra, sed poste por nia promenado en Akko ĝi kviete malaperis, lasinte preskaŭ sennuban ĉielon. Dum la dua ekskursita tago ni detale konatiĝis kun la ĝardenoj de Bahaanoj. Ili, la ĝardenoj, estas neripeteble admirindaj; la akompana detala rakonto de Jehoŝua malkovris la historion de tiu pacama religio. Krom la vizito al la ĝardenoj ni faris promenon en la iama germana kolonio kaj, post bongusta tagmanĝo, promenis laŭ la urbo memstare, sen la ĉiĉerono. Dum la tria ekskursita tago nin prenis Amri. Per lia aŭto ni vizitis tiom da belaĵoj, ke mia kapo estis plenplena je impresoj: Nazareto, Galilea maro, Jordan-rivero... Malfruvespere nur ni venis al Tel-Avivo, kaj per amikaj adiaŭaj brakumoj finiĝis nia ekskurso.



Dankon, Israelo, dankon, la ĉiĉeronoj!



Sed mi, bonŝanculo, havis ankaŭ ekstran programon en la lando. Sekvatage Amri ofertis al mi mergiĝon en la vivon de la antikva Jerusalemo. Dum la tago ni sukcesis vidi kelkajn diversekleziajn preĝejojn, inkluzive la rusortodoksan, kiun eĉ Amri mem neniam vizitis antaŭe. Ni spektis filmon pri la historio de la urbo, trairis subterajn tunelojn, tagmanĝis en la araba restoracio Al Burak (leĝenda ĉevalo de Mahometo) kaj promenis en la brua bazaro de la malnova urbo. Dankon, Israelo, dankon Amri!

Pli ol duonon de mia lasta tago en Israelo mi pasigis en agrabla hejmo kaj en agrabla kompanio de Nava por vespere kune veni al la krona aranĝo de mia vojaĝo – al la edziĝfestoj, kie la bela kaj nepre aminda fianĉino estis Maja, la filino de Amri. Neniam antaŭe mi ĉeestis judan edziĝfeston, do la tuta afero estis tre interesa nova sperto por mi. Dankon, Israelo, dankon, Nava, mia gastigantino, dankon, miaj afablaj invitintoj – Amri, Gila kaj Maja!

Frumatene de la sekva tago mi veturis en la flughavenon Ben Gurion, kaj post ioma atendo plus kvinhora flugo mi devis elvalizigi mian varman jakon kaj ĉapon. La hejma Peterburgo akceptis min per normala komencprila subnula temperaturo kaj pika vento.



Se oni demandus min, ĉu mi spertis ian malkomfortaĵon en Israelo, mia respondo estus “jes”. Mi, posedanta la jidan lingvon, scipovis legi ĉiujn surstratajn afiŝojn, anoncojn kaj presaĵojn. Sed mi nenion komprenis! Ĉar la lingvo estis hebrea, tute malsama al tiu, kiun mi regas. Verŝajne, mi devas dediĉi ioman tempon al studado de la hebrea, kun espero iam denove veni al la belaĵoj kaj antikvaĵoj, al la tenera klimato kaj afablaj homoj. Dankon, Israelo!

*Mikaelo Bronŝtejn, Rusio*

PS: Suplemente mi aldonu la kanton, kiun mi verkis sidante en la peterburga flughaveno:

*Por la kongreso de ELI*

Mia prapatrujo, Israel’  
daŭre ja alvokis vi min el  
la transmara foro.  
Kun animdoloro  
revis mi pri via lakto kaj miel’.  
Nun en la komforta avi’  
flugas mi denove al vi

kun humoro bona,  
je la sentoj plena  
flugas mi denove al vi.  
Dormas en valizo nun kun pret'  
iam donacita vert-ĉapet'.  
libroj, la multpaĝaj,  
ŝercoj porvojaĝaj  
versoj de l' maljuna, tamen plu poet'.

Tie, trans la blua vasta mar',  
loĝas mia juda gefratar'.  
Kiel ĉiam – same  
bonvenigas ame,  
kaj mi antaŭĝuas la renkonton, ĉar –

La esperantista ĉarma rond'  
Venas por kongres' en Aŝkelon.  
Amikar' senlaca,  
la medio paca –  
Por admir' kaj miro de la tuta mond'.

**27.03.2017, Pulkovo**



Postkongreso, preĝejo de la Anunĉiaco, Nazareto

## Viva 18-a Israela Kongreso apud kvar maroj

**A.Wandel**

*Aperis en la revuo Ondo de Esperanto, junio 2017*

En la juda tradicio la nombro 18 havas specialan signifon, ĉar ĝia transskribo per hebreaj literoj (יח) signifas "vivo". Ne estas do mirinde, ke la 18-a Israela Kongreso, okazinta en la suda mediteranea urbo Aŝkelon inter la 30.3–1.4, estis aparte vigla. La agrabla vetero invitis la partoprenantojn baniĝi en la plaĝo apud la kongresa hotelo "Leonardo", unu el la plej novaj kaj luksaj en la urbo. Dum la antaŭ- kaj post-kongresaj

ekskursoj la eksterlandaj partoprenantoj havis la okazon naĝi en tri pliaj maroj: la Ruĝa, la Morta kaj la Galilea.

La partoprenantoj ricevis amason da dokumentoj kaj regaloj: ĉe la akceptejo, tuj post la alveno, oni ricevis la nomŝildon kaj la programbroŝuron, videbla ankaŭ rete

<http://esperanto.org.il/dosieroj/IK18libro.pdf>. Aldone al la detala programo kaj la listo de partoprenantoj, ĝi enhavis kompilaĵon de ĉiuj 18 Israelaj Kongresoj (kiuj ĝis 2010 nomiĝis "KIES", Komuna Israela E-Semajnfino), okazintaj ĉiujare ekde 2001. Sekve oni ricevis freŝe printitan ekzempleron de la nova numero de la revuo "Israela Esperantisto", kun artikoloj pri la pasintjara Israela Kongreso en Jafo, verkitaj de tri el ĝiaj eksterlandaj partoprenantoj. Ankaŭ ĝi estas libere videbla rete: [http://esperanto.org.il/dosieroj/IE162\\_3.pdf](http://esperanto.org.il/dosieroj/IE162_3.pdf). Krome ĉiu partoprenanto ricevis turisman pakaĵon donace de la municipo de Aŝkelon.



Komuna foto en la urba parko de Aŝkelon

Estis 50 partoprenantoj, inter ili sep eksterlandanoj, el Germanio, Usono, Rusio, Latvio kaj Litovio. La artan programon gvidis la konataj bardoj Edgar (de la grupo Asorti) kaj Mikaelo Bronŝtejn. Koncertoj okazis en la vesperoj, kaj kant-ateljero posttagmeze.

En la muzikaj vesperoj kantis ankaŭ la "lokaj" talentoj Ŝoŝia, kun kantoj el sia esperanta KD "Nova Tago Venis", eldonita la pasintan jaron, Enrica, kaj surprizo – la plej



juna partoprenantino, la kvar jara Alma Vodevoz (filino de Eran) deklamis infankanton en E-o. Tali Wandel prezentis en ambaŭ vesperoj eŭritmiajn E-dancojn, kaj dumtage ŝi gvidis eŭritmian laborgrupon. La matenoj estis dediĉitaj al ekskursoj. Amri ĉiĉeronis en pluraj belaj turismaj anguloj de Aŝkelon, urbo ne multe konata eĉ al israelaj partoprenantoj, pluraj el ili asertis, ke tio estis ilia unua vizito al tiu urbo. Vendrede oni vizitis la



"Sarkofago-parkon", arkeologia centro kie oni eksponas belegajn gravuritajn ŝtonajn sarkofagojn (kesto por kadavro) el la romia epoko, kaj la apudan hejman muzeon de la mondfama mozaika artistino Ilana Ŝafir. Sabate oni ekskursis al la aŝkelona apudplaĝa parko, kie troviĝas la plej antikva arko

La antaŭkongresa ekskurso en Petra

de la mondo, kiu aĝas 4000 jarojn, belaj marbordaj pejzaĝoj kaj antilia puto de la otomana epoko.

Ankaŭ la kleriga programo estis varia kaj inkluzivis du prelegojn de Bronŝtejn pri rusaj kaj jidaj bardoj, Amri prelegis pri astrobiologio kaj pri vojaĝo al Etiopio, Gabi pri tri famaj sciencistoj.

En la tradicia ferma diskuto oni vane atendis kritikojn kaj plendojn. Estis nur laŭdoj, krom pri la kosto de la hotelo, kiu estis iom alta. Fine de la diskuto oni kolektis ideojn por la loko de la venontaj Israelaj Kongresoj. Por la venonta jaro estis proponita la norda parto de Israelo, ekzemple Akko. Por la post-venonta, la 20-a Israela Kongreso Amri proponis Eilat ĉe la Ruĝa Maro. Intertempe la ideo evoluis kaj oni jam planas kombinitan eventon en 2019: la Israela Kongreso en Eilat kaj tuj sekve la Mezorianta Kongreso en la jordania najbara urbo Akaba.



Kun Mara el Latvio ĉe la Morta Maro

Antaŭ la Kongreso, dek personoj partoprenis la 5-tagan ekskurson al Jerusalemo, la Morta Maro, Masado, Eilat kaj Jordanio (Petra kaj Wadi Rum). Post la kongreso ses s-anoj partoprenis 3-tagan ekskurson al Haifa, Akko, Nazareto, monto Tavor kaj la Lago de Galileo.

Fotoj de la Kongreso:



[https://get.google.com/albumarchive/105030054444214202226/album/AF1QipORlr1IfMIY\\_jzxwBslJQPJaSbkeTOeKpdsR\\_-w](https://get.google.com/albumarchive/105030054444214202226/album/AF1QipORlr1IfMIY_jzxwBslJQPJaSbkeTOeKpdsR_-w)

kaj de la antaŭ-kongresa ekskurso:

<https://get.google.com/albumarchive/105030054444214202226/album/AF1QipMuQpMtFrmAVk53idJV6zGlnDbGj9MWKWZ7KnlL>

## La restaŭro de la panelo "Patro Nia" ĉe la Oliva monto en Jerusalemo

Yehuda Miklaf



Inaŭgura ceremonio de la nova tabulo en preĝejo "Patro Nia". De maldekstre: Garo, la artisto kun sia edzino, Yehuda kun edzino, Jehoŝua, la franca konsulo, Amri kaj Tali

Antaŭ kelkaj jaroj vizitis nin katolika pastro el Germanio, pastro Bernhard Eichkorn. Li venis kun mi al la sinagogo vendrede vespere kaj poste vespermanĝis kun ni. Unu tagon antaŭe mi interkonsentis kun la sinagoga kantoro ke li anoncu post la sinagoga servo esperantlingve: "Bonvenon pastro Bernhard Eichkorn el Germanio, gasto de Yehuda."


Bernhard iomete surpriziĝis kaj diris al mi: “Li parolas Esperanton – kaj li parolas pri mi!”

Post du aŭ tri jaroj Bernhard vizitis en Israelo denove kaj denove venis al la sinagogo kaj vespermanĝis kun ni. Sed tiuokaze mia tuta familio partoprenis. Survoje hejmen de la sinagogo, mia nepino diris: “Rigardu Avi, du ambulancoj”. Bernhard demandis: “Ĉu ŝi parolas Esperanton?” kaj ŝi tuj komencis kalkuli en Esperanto ĝis 44.

Dum la dua vizito Bernhard rakontis al mi ke la esperanta panelo en la preĝejo Patro Nia difektiĝis kaj ke li kolektis monon por ripari ĝin. Li lasis la monon ĉe mi, kaj mi transdonis ĝin al la monaĥinoj en la

preĝejo. Mi rilatis unue kun fratino Elisabeth, eta kaj ege ĉarma virino, kaj ŝi estis mia kontakto por renovigi la ŝildon. Estis necese kolekti pli da mono, kaj pastro Bernhard kun helpantoj

prizorgis tion kaj Renato Corsetti instigis esperantistojn donaci monon. Finfine la mono kolektiĝis kaj la monaĥinoj dungis Garo Sandrouni, kiu faras kahelojn en lia vendejo en la Armena Kvartalo de la Malnova Urbo de Jerusalemo. Mi laboris kun Garo por esti certa, ke la teksto estis ĝuste farita. Garo faris bonan laboron kaj la nova ŝildo estas bela kaj pli bona ol la malnova.



Artikolo pri la nova tabulo Patro Nia en "Espero Katolika"

# Impresoj de la Itala Kongreso

Jael Ŝelaĥ

Mi estas Jaela. Mi partoprenis la 84-an Italan Kongreson de Esperanto, kiu ĉi-jare okazis en la itala regiono Basilikata, en Policoro (Heraclea). Heraclea estas antikva greka urbo en suda Italio ĉe la maro. En la urbeto centro estis kongresa aŭto.



La kongresa temo estis **Kulturo kaj Komunikado en Eŭropo**:

La kongresejo estis en la Heracla Hotelo kiu troviĝas kelkajn minutojn piedmarŝe de la maro. Inter la programoj ni ĝuis la sunon, la maron, kaj la naĝejon de la hotelo. Entute partoprenis pli ol 220 personoj el 45 landoj.



Ni kantas kun "Kajto"

Dum la kongresa semajno oni povis paroli, ridi, diskuti, ekskursi, manĝi, kune, ĝui prelegojn, muzikon, arton, babiladon – kaj ĉio en Esperanto... Tiuj tagoj estis belaj kaj agrablaj. Ĝenerale mi vere ĝuis la kongreson, la geamikojn, la etoson. Mi estis tre feliĉa renkonti malnovajn geamikojn denove kaj kompreneble mi renkontis novajn geamikojn el diversaj landoj.



Mi ekskursis multe dum la kongreso, mi vizitis multajn belajn kaj interesajn lokojn.



Ekzemple, la arkeologia parko en Meta Ponto.

## לידיה זמנהוף – וורשה, טרבלניקה, יד ושם

Lidia Zamenhof היתה בתו הצעירה של יוצר שפת אספרנטו, לודויג אליעזר זמנהוף, שהשנה מלאו 100 שנים לפטירתו, בשלהי מלחמת העולם הראשונה. היא נולדה ב-29 בינואר 1904 בוורשה, ונרצחה לפני 75 שנים במחנה ההשמדה טרבלניקה, במלחמת העולם השנייה.

לידיה זמנהוף למדה אספרנטו כילדה בת תשע. בת 14 היא כבר תרגמה ספרות פולנית לשפת אספרנטו. כעבור כמה שנים הופיעו פרסומים מקוריים שלה בשפת אספרנטו. לאחר שסיימה את לימודיה באוניברסיטה למשפטים, בשנת 1925, היא הקדישה את עצמה להוראת והפצת שפת אספרנטו. באותה שנה, במהלך קונגרס האספרנטו העולמי ה-17 בג'נבה, הכירה לידיה את הדת הבהאית. היא פעלה בארגוני אספרנטו רבים: בליגת הסטודנטים הבינלאומית, באגודת האספרנטו העולמית, במכון להוראת אספרנטו בשיטת Cseh ובאמונה הבהאית. בנוסף לידיה כתבה עבור כתבי עת רבים, בפרט מחקרים על ספרות פולנית. היא התפרסמה בתרגומה משנת 1933 לרומן "קו וואדיס", מאת הנריק סנקייביץ', שזכה בפרס נובל על יצירה זו. בשנת 1937 נסעה לארצות הברית אך נאלצה לשוב לפולין בסוף 1938 כיוון ששירות ההגירה לא האריך את האשרה שלה. בפולין הרצתה ולימדה אספרנטו. לאחר פרוץ המלחמה הפך הרחוב שבו התגוררה לחלק מגטו ורשה. בגטו פעלה רבות כדי לעזור לאחרים. היא סירבה להצעות שונות של דוברי אספרנטו פולנים לסייע לה להימלט ולהינצל, וכתבה שעליה להיות עם בני עמה.

ב-2004, במלאת 100 שנים להולדתה של לידיה, נחנך ב"יד ושם" מסד נתונים ברשת, המציג את שמותיהם של 3 מתוך ששת מיליוני הנרצחים בשואה. התברר ששמה של לידיה זמנהוף לא נכלל בו, כיון שלא הוגשה בקשה בצירוף דף העדות הנדרש. כדי למלא חוסר זה, פנה יוסף שמר, מפעילי האגודה לאספרנטו בישראל, לגברת אווה תורן, שהכירה אישית את לידיה. בשנת 1993 סיפרה אווה בכנס האגודה לאספרנטו בתל-אביב על היכרותה עם לידיה, אשר גרה בשכונת באותו רחוב בוורשה. סיפורה הופיע במאמר בביטאון האגודה לאספרנטו בשנת 1993. אווה שהייתה אז בת 14, הייתה העדה האחרונה שראתה את לידיה, באקציה שנערכה ב-5 לספטמבר 1942, נלקחת לרכבת לטרבלניקה. היא סיפרה שלידיה הלכה אל גורלה גאה וזקופת קומה כמלכה. בינואר 2005 מילא יוסף שמר את דף העד שאווה חתמה עליו ושלח אותו ליד ושם. אחרי מספר חודשים נוסף שמה של לידיה למאגר השמות של יד ושם, שם גם ניתן לראות את דף העד.

[http://yvng.yadvashem.org/index.html?language=en&s\\_lastName=Zamen, hof&s\\_firstName=Lidia&s\\_place=Warsaw](http://yvng.yadvashem.org/index.html?language=en&s_lastName=Zamen, hof&s_firstName=Lidia&s_place=Warsaw)  
 ובקיצור <http://zik.co.il/lidiazam>.

יוסף שמר (1950–2012) פרסם את סיפור דף העד בביטאון האגודה לאספרנטו בשנת 2005. מאמר זה, כמו גם סיפורה של אווה תורן משנת 1993, מופיעים באסופת מאמריו בספר שערכתי לזכרו, שיצא לאור ב-2016. ראו בקטלוג UEA:  
<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9330>

YAD VASHEM		יד ושם	
The Holocaust Martyrs' and Heroes' Remembrance Authority		שות חינוך לשואה ולגבורה	
Hall of Names - P.O.B. 3477, Jerusalem 91034 www.yadvashem.org		יביל השמות - ת.ד. 3477, ירושלים 91034	
<b>Page of Testimony</b> דף עד			
דף עד ליישום הנצחה של ההספים בשואה, נא למלא דף עבור כל נוסף בנפרד, בכתב ברור ובאותיות דרום. Page of Testimony for commemoration of the Jews who perished during the Shoah; please submit a separate form for each victim, in block capitals.			
תמונת המספר (צילום) אם ליישום את סעיף של חוק המתיישב (בדף המתיישב) על המסמך (אם לא ליישום) Victim's photo Please write victim's name on back. Do not glue.		שם משפחה של הנספח Victim's family name: ZAMENHOF - זאמנהוף	
שם משפחה לפני היישוב אחר Previous/other family name:		שם משפחה הישורי אחר First name (also nickname): LIDIA לידיה	
Approx. age at death: 38 יום שנולדה בעת המות		Date of birth: 29-04-1904 Gender: M/F ( ) Title: MAGISTER	
Nationality: פולנית (Polska) Nationality at death: פולנית (Polska)		Region: WARSAW ורשה Place of birth: ורשה	
Victim's father: Family name: ZAMENHOF - זאמנהוף First name: LAZAR LUDWIG - לזר לודוויג		Victim's mother: Maiden name: ZILBERNIK First name: KLARA - קלרה	
Victim's wife/ husband: No. of children: 2 Family status: נשואה Maiden name:		First name:	
Address: Warsaw		Permanent residence: WARSAW - ורשה	
Member of org./movement: ESPERANTO / BAHAIISM		Profession: מנהל	
Address: Grodowa 3		Residence during the war: ורשה	
Places, events and activities during the war (prison / deportation / ghetto / camp / death march / hiding / escape / resistance / combat): גטו ורשה, מחנה אוטמורה ז-59, זרימה לטרבלינקה, מחנה אוטמורה			
Date of death: 5-09-1944 Country: פולין		Place of death: TRSB. Region:	
Circumstances of death: רצח			
אני הח"מ, בעזרת כוחי על המידע הזמין לי, מצהיר כי המידע הנ"ל נכון ונכון כמיטת ידי. ידוע לי כי דף עד זה נכלל ביישום מסוים ויחיד ליישום ליישום. I, the undersigned, hereby declare that this testimony is correct to the best of my knowledge. I understand that this Page of Testimony and all the information on it will be publicly accessible.			
Previous handler name: HELLER		Family name: TOREN First name: אלה	
Tel: 03-587-035		Street/ House No. Apt: 4	
Relationship to victim (family): בת זוג		Country: ישראל	
Special questions may be asked in to submit details of Shoah services: During the war in (prison / ghetto / camp / death march / hiding / escape / resistance / combat) or (other relevant options)			
Date: 27/1/05		Signature: אלה תורן	
"...מאתי ליום בנותי ומהפנתר יד שם... אשר לא יפרת"			
"And shall give them in My House, and within My walls a memorial and a name that shall not be cut off."			

# Itamar kaj Lidja, Vintra Renkontiĝo

Jonathan Mizrahi, Israelo

Tradukis: A. Wandel

La novelo aperis en la kultura suplemento de la ĵurnalo "Haaretz", kiel "Rekomendita Verko", kadre de "Konkurso de la Mallonga Rakonto" por la jaro 2017. La hebrea originalo troviĝas sekve de la traduko.

Tiu rakonto estas parto de novelo, kiun la aŭtoro estas verkanta por plena libro. La rakonto estas fantazia: laŭ nia scio, Itamar kaj Lidja neniam renkontiĝis, sed la aŭtoro serĉas informojn pri tia kontakto, kaj aparte pri opiniesprimoj de Zamenhof pri la novhebrea projekto de Eliezer Ben-Yehuda. Inverse, Ben-Yehuda publikigis en sia gazeto "Doar Hajom" la 30.10.1925 tutpaĝan artikolon pri Esperanto kun konciza gramatiko (ĉi-sube).

Kaj kiam la enmigra oficisto demandis "nomo de la patro", li respondis ĝentile, "Eliezer, Eliezer Ben-Yehuda". Kaj kiam ŝi estis demandita, ŝi respondis per iomete tremanta voĉo, "Eliezer, Eliezer Ludwig Zamenhof". Kiam oni petis lin "naskiĝjaro de la patro", li respondis "1858", kaj ŝi respondis "1859". Kaj al la demando "kie la patro naskiĝis", ambaŭ respondis, aparte, "Pollando, ĉe la limo de Belorusio" kaj "Belorusio, ĉe la limo de Pollando". Kaj responde al la demando pri la patra profesio, li diris "reviviganto de lingvoj" kaj ŝi diris "aŭtoro de lingvoj".



Novjorko, decembro 1938

Vortoj. Vortoj kiel marteloj. Marteloj de vortoj kun bruego, metala, kradoplana sono. Maŝinoj de parola lingvo, kies koro estas farita el piŝtoj de vokaloj kaj konsonantoj, kiuj frapas en lia kapo senĉese. Kaj ĉirkaŭe

ĉio estas blanka. Frostita. Fora. Fremda. Nigraj feraj kolonoj de stratlampoj, kiuj staras kiel vicoj de stano-soldatoj apud la domoj, lumigas la neĝan trotuaron per flava, nebula, melankolia lumo. La neĝkovrita trotuaro reflektas feblan, mustardan brilon. Kaj apud ĝi, ŝlima akvo, kiu estas daŭre tranĉata de la mallarĝaj kaŭĉukaj radoj de grincantaj veturiloj, kiuj disĵetas sulkojn de likva, griza, grasa suko, kiu ŝprucas kaj ripozas sur la neĝkovrita pavimo. Neĝo, kiu jam frostiĝas kaj fariĝas glacio. La neĝo, kiu perdas la purecon kaj la molecon, kiun ĝi posedis antaŭ nur kelkaj horoj, kiam ĝi falis teren, kaj nun makuliĝas per la griza, malklara ŝpruco. Kaj li iras, kaj liaj ŝuoj presas la neĝon kaj la kloak-ŝprucaĵon en densan grizan kaĉon, kaj desegnas tiuokaze bone markitan padon de malhelaj, preteratentaj paŝoj tra la malpura neĝtabulo.

Kaj malvarmas. Malvarmego frostiga, penetra, tranĉanta. Kaj liaj oreloj, tiuj, kiuj aŭdis tiom multe da vortoj, kun sono kriegita, penetra, sed vigla. Oreloj aŭdintaj en la patrino utero gajajn avidajn vortojn de Ĥ kaj de A kaj de ruliĝanta R. Ĉi tiuj oreloj nun turniĝas en frostitan kristalon, pendantaj-falantaj ambaŭflanke de lia kapo. Kaj ĝuste tie ĉi, kie la vortoj estas tiel molaj, ruliĝantaj, glitantaj kaj ĝentilaj, ĉi tie, kie la vortoj estas prononcataj per voĉo malforta, mallaŭteco dorlotanta la orelojn, kiom, li pensas al si, tiu ĉi vintra



Lidja Zamenhof

blanka kvieto foras nun de lia malproksima, fadinta Jerusalemo, vaporuma kaj ŝvita. Jerusalemo, kiu somere varmegas en hela azura lumo de aluminio kaj ŝtalo. Jerusalemo de hejmo, de odoroj de varma kuirado “Ĉolent” en vintraj sabatoj, kaj de petroselo kaj cinamo kaj malvarma lakta dolĉa “Malabi” en la varmega somero. Kaj kiom ĉi tie, ĉio tiel foras de lia Jerusalemo.

Kaj kiom mi nun estas malproksima de la infano kiu mi estis, pasas laca penso en lia kapo. De la knabo, kiu sidis tiel fiera sur la altigita tabureto, portanta blankan flagon skribitan en la hebrea: “la flago de la kampo de Judeo de la armeo de Israelo”, kun altaj ŝuoj kun brunaj laĉoj kaj



malgranda kalkano, surkape turka ĉapelo, malgranda por lia mezuro. Li rememoris, ke li estis vestita kiel rusa kozako, per festotaga vestaĵo, kiun oni sendis kiel donacon, en kesto volvita en malnovaj gazetoj, kunligita per bukliga verda pajla ŝnuro. Skatolo ornamita per poŝmarkoj el fora lando. Miaj geavoj, la gepatroj de miaj du patrinoj kaj la savintoj de mia patro de la malproksima urbo de Glubkia en fora Rusio, pakis la vestaĵon kaj sendis ĝin kiel donacon al mi, ilia fier-nepo, kiu kreskis en la malproksima rokdezerta lando. Ili esperis, ke li foje surmetu la dikan rusan kotonan ŝtofون kun amelita kolumo, spicita per laodoro de Panjo Rusio, kaj tiel li memoru siajn geavojn de tiu granda blanka lando.

Kaj tiam, tiumatene en la jerusalema ateljero de la fotisto de Shlomo Narjenski en la ateliero “Palestine”, vidalvide de la franca pastrejo, kiam mi rekonis, eventuale por la unua fojo en mia vivo, sub la akra barbo de mia patro, Eliezer, maloftan, preskaŭ varman rideton de fiero, de kontento, kaj eble eĉ de ambaŭ. Kiam mi konstatis la vualitan mildon en liaj okuloj.

Mildo kiel silko el malproksimaj landoj, kiujn mi ĉe li vidis neniam antaŭe. Kaj fakte, nek poste. Mia duonpatrino, Beila-Hemda, estis klinanta kontraŭ la ŝultro de paĉjo, kaj ili aspektis kiel du, kiuj dum malmultaj momentoj ŝajnis esti kunfanditaj en unu pecon, unu korpon, unuforman saturitan animon, dum la tuta mondo glaciigis ĉirkaŭ ili.

Nur du semajnojn pli frue, en la giganta alvensalono de Ellis Island, Lidja staris kelkajn paŝojn de li, ŝnureto de dikaj lignaj bidoj sur ŝia kolo, iomete kurbita, gutetoj de ŝvito glitantaj sur ŝia frunto, en la paralela vico por la enmigra oficisto. Estis ĉi tiu salono



Eliezer Ben-Yehuda

kvazaŭ intermondo, apartiganta inter malapero kaj asimilado, inter putrado kaj florado, inter vivo kaj morto. Salono sorto-decidanta. Enirejo aŭ elirejo. Pordego, kiu decidis inter tiuj, kiuj povos rekomenci sian vivon en la Nova Mondo, kaj tiuj, kiuj estos resenditaj. Kies voĉoj silentos, eble eterne. Kaj kiam la enmigra oficisto demandis “nomo de la patro”, li respondis ĝentile, “Eliezer, Eliezer Ben-Yehuda”. Kaj kiam ŝi estis demandita, ŝi respondis per iomete tremanta voĉo, “Eliezer, Eliezer

Ludwig Zamenhof”. Kiam oni petis lin “naskiĝjaro de la patro”, li respondis “1858”, kaj ŝi respondis “1859”. Kaj al la demando “kie la patro naskiĝis”, ambaŭ respondis, aparte, “Pollando, ĉe la limo de Belorusio” kaj “Belorusio, ĉe la limo de Pollando”. Kaj responde al la demando pri la patra profesio, li diris “reviviganto de lingvoj” kaj ŝi diris “aŭtoro de lingvoj”. Kaj ŝi aŭdis. Kaj li aŭdis. Kaj estis klare, ke ili renkontiĝos denove. En la nova lando.

Kaj tri semajnojn pli frue, en la granda maro, en la malferma spaco inter la malnovo kaj novo, inter la dense amasitaj benkoj ŝarĝitaj de laco, doloro kaj esperoj, kaj odoro de vomo de ter-homoj en ŝtorma maro, miksitaj kun la parfumoj de la glora Eŭropo, kaj malnovaj brunaj ledaj valizoj kaj ŝaloj, kaj peltaj manteloj kiuj konis pli glorajn tagojn, iliaj rigardoj jam renkontiĝis, provante, mirante, eble sopirante eliron, esperon, trankvilon, amikecon brakumantan, komfortan. Kaj nun, kiam li estas survoje, sur la grizmakulita neĝa trotuaro, en fruvespera horo, por renkontiĝo ĉe novjorka kafejo sur la Malsupra Orienta Flanko de Manhatano, kaj ŝi, forte tenante sian brunan ledosakon sur siaj genuoj per palaj manoj, gapante en la malhelan tunelon, kie la metroo rampas kiel blinda mongozo en sia truo, la renkontiĝo, kiu neniam okazis inter ŝia patro kaj lia patro, estas pli proksima ol iam.



Itamar Ben-Yehuda

Kaj en la galopanta mongozo, skuataj de ĝia movado, la homoj staris dense pakitaj, kaj kiel falintoj alkroĉiĝantaj al sola branĉo, falante de pendanta klifo, ili provis mane kapti la apogilon de proksima seĝo aŭ la supran tenilon de la vagono, antaŭtenita kvazaŭ kontraŭvole. Kaj la starantaj personoj ŝajnis kiel muta homamaso, kunfandita el viroj en tvidaj kostumoj, beĵaj kaj profund-blua-koloraj, kaj el virinoj fermitaj en komercaj roboj el silko, sateno kaj ĉifono. Kaj ĉiuj, tiel ŝajnis al Lidja, havis malplenan, iomete enuitan rigardon, iom kiel la malplenaj sakoj kiujn ili portis. Tiuj, kiuj matene estis plenaj de promesoj de dikaj sandviĉoj por la tagmanĝo, kaj nun estis orfaj, kvazaŭ atendantaj porti la sandviĉon de morgaŭ. Anticipante la renkontiĝon kun Itamar, ŝi sentis kiel

gejsero plena de atendoj antaŭ ĝia erupcio, dum la homamaso ĉirkaŭ ŝi nur deziris atingi la hejmon, aŭskulti la radion kaj retiriĝi por dormi. La ŝtalaj radoj de la mongozo akre kriis per sono de skrapanta metalo, brulante la relojn. La homamaso kun glacia rigardo deziris aŭdi nur silenton. Kaj Lidja aŭdis en la metroaj bruoj konatajn, oldajn melodiojn – la tiksonojn de la malnova tajpilo de ŝia patro en liaj fruaj jaroj, dum li kunplektis vortojn en frazojn dum siaj noktaj tajpadoj, kiuj estis por ŝi “lulkantoj” de ŝia infanaĝo, kiel ŝi poste skribis en letero al amikino. Ŝia patro, diference de la patro de Itamar, vidis en la lingvo alian esperon, tute malsaman de tiu de la alia Eliezer. Eliezer Ludwig Zamenhof, la patro de la juna virino kiu nun estis sidanta en la trajno, pensis ke lingvo povas esti ponto al pli bona kaj pli amanta mondo inter homoj, kies lingvo estis disigita en la pratempo<sup>1</sup>. “Esperanto” – espero – li nomis la lingvon, kiun li ŝpinis jam kiel knabo<sup>2</sup>. Kaj Lidja, kiel Itamar, estis la ambasadorino kaj mesaĝo-portantino de la lingvo de sia patro.

Torditaj estas la vojoj de la historio. Ŝia patro kaj lia patro neniam renkontiĝis. Kaj kvankam ili ambaŭ estis membroj de la sama gento, kaj deklaris sin cionistoj, kaj kvankam ili naskiĝis malpli ol tricent kilometrojn aparte kaj nur unu jaron unu post la alia, kaj kvankam ambaŭ lernis medicinon kaj metis la lingvon en la centron de siaj vivoj, la sorto elektis ke iliaj vojoj ne kruciĝu. Kaj eble ne estis la sorto, kiu ilin ne kunvenigis. Eble ili ambaŭ konsciis, ke iliaj vojoj en la lingvo kaj penso estis tiel malsamaj, ke ili neniam trovis sencon por tia kunveno. La du Eliezer-oj – iliaj gepatroj – eĉ apenaŭ menciis unu la alian, krom mallonga artikolo en la ĵurnalo “Hatzvi”<sup>3</sup>, la 12-an de februaro 1909, en kiu lia patro komparis la artefaritan lingvon de ŝia patro al Golem, “tiu, kiu laŭ ĝia korpo similas al homo, sed nur eta afero mankas: vivoporto”. Kaj ŝia patro, la decidita kosmopolito, por kiu Esperanto estis nur skafaldo farita el lingvo por starigi mondkoncepton kaj novan universalan homan religion kiun li fondis – la Homaranismo – certe ne trovis sencon provi konvinki la patron de Itamar, profeto de la renaskiĝo de la popolo en sia lando, rufhara, kun akraj barbo kaj temperamento, ke la mondo povus kaj devus esti malpli akra, pli bunta, kaj precipe pli kompatema. Kaj jen ili du

<sup>1</sup> Aludo al la babela rakonto.

<sup>2</sup> Historie ni scias ke tio ne estas akurata. La pseŭdonimo "D-ro Esperanto" aperis nur en 1887.

<sup>3</sup> Gazeto redaktita de Ben-Yehuda. Efektive, kiel supre montrita, Ben-Yehuda ja dediĉis tutpaĝan artikolon al Esperanto en 1925.

renkontiĝas. Per iliaj proparolantoj, iliaj infanoj. Du lojalaj ambasadoroj, kies tempo estas limigita, kies emocioj estas konfuzitaj, kaj ilia ŝarĝo peza. Kaj tiam ili renkontiĝis. Kaj kvankam ili neniam interkonatiĝis, kaj kvankam ili ne sciis pri la ekzisto unu de la alia, ili ambaŭ sentis kiel paro de amikoj, kiuj havas multon por kompletigi, pli ol devus senti sin du personoj, kiuj renkontiĝas por la unua fojo. En la vivoj de ambaŭ estis streĉitaj tiom da paralelaj linioj, tiom da momentoj de sufero kaj tiom da promesoj, ĉiuj kunteksitaj kaj interplektitaj en malgrandajn momentojn de feliĉo kaj malĝojo. Du malgrandaj infanoj, kiuj kreskis preskaŭ tuj, du infanoj, kiuj la tutan vivon portis pezan ŝarĝon, tro reprezentan. Ilia vivpado estis preskaŭ dekomence determinita por trakti vortojn, frazojn, alineojn – en lingvo. Kaj la persone elektebla spaco de ambaŭ, la povo direkti la padon de siaj vivoj, kvankam ekzistis en siaj koroj, estis subpremita kaj kaŝita dum la jaroj sub dikaj, densaj tavoloj de sintaksaj cirkonstancoj, de devontiĝo, kaj de signifoj. Kaj la du lingvoj kreitaj de iliaj du patroj, Eliezer kaj Eliezer, por tute malsamaj celoj, estis tiom malsamaj, ke ili kreis, laŭ la naturo de lingvoj, tute malsamajn realaĵojn, tiom diferencajn, ke la du ŝajnis ekzisti kvazaŭ en du paralelaj mondoj, esence malsamaj. Kaj malgraŭ la diferencoj en la sonoj kaj reguloj de la du malsamaj lingvoj, kiujn ili portis kun si kiel partoprenantoj en kuradkonkurso, por pasigi la torĉon plu – la hebrean de unu flanko, kaj Esperanton de la alia – iliaj sonĝo kaj vivspertoj estis esence similaj. Ĉi tio evidentiĝos al ili poste. Tiel aŭ aliel, la tragika fino de ili ambaŭ estis alvenonta malmultajn, mallongajn jarojn post ilia unua renkontiĝo en tiu ĉi kafejo, kie ili nun sidas, en la frostita Novjorko de decembro 1938, nur dek monatojn antaŭ la eksplodo de la Dua Granda Milito.

En la kafejo, kiu konis pli bonajn tagojn, pli feliĉajn homojn kaj pli gajan muzikon, ili renkontiĝis. Sidante apude en lignaj seĝoj, kies manapogiloj estis kadukaj pro aĝo, en kies nigra apogil- kaj sidej-ledo estis bruligitaj blankaj fendoj, kiel blankaj kapflankaj haroj de tiuj, kiuj aŭdis multajn konversaciojn en la pasinteco. Nenio preparis ĉi tiujn seĝojn por tio, kion ili estis aŭdantaj en la sekvaj horoj kaj renkontiĝoj. Itamar parolis unue. Kaj el ĉiuj miloj da vortoj kiuj floris en lia kapo, kiuj volis samtempe elŝuti, kvazaŭ vortoj ne submetiĝas al la linia kontinuo derivita de la naturo de la homa voĉo kaj de la strukturo de frazo regulita kaj kontrolata de gramatiko kaj sintakso, elŝteliĝis el lia buŝo unu vorto, orfa kiel li: “Bela”. Kaj Lidja pensis: “Novjorko.” Kaj li pensis: “Vi estas tiom

bela”, sed li tion ne kuraĝis diri. Kaj tiam li subite rekuperis sin kaj tuj korektis la momentan konfuzon en la sekva frazo, kiu transiris la baron de siaj lipoj: “Ĉi tiu urbo estas tiel bela”. Kaj ŝi ĝojis, ke ŝi komprenis, kvankam erare, lian intencon . Kaj post kelkaj pliaj enkondukaj frazoj, kiuj temis pri vetero – ŝi kreskis en loko malvarma, kaj li en loko varma; en la loko de kie ĉiu el ili venis, ŝi el la nobla kaj brilanta Varsovio, kaj li el lacige sankta urbo, kiu estas ankaŭ antikva kaj ĉifita kaj apenaŭ ŝanĝiĝis dum la miloj da jaroj de ĝia ekzisto – kiom diferencis la ĉi-tieaj homoj, de tiuj, al kiuj ili alkutimiĝis – ĉe ŝi la homoj elradiis orient-eŭropan malvarmecon, sorbitan de vaporoj de brando kaj rostita fazano, kaj ĉe li ili elsendis akran mezorientan varmecon, de okraĵo en tomato-sauĉo kaj dolĉa nigra kafo en etaj kafotasoj – ili finfine alvenis al vera konversacio inter ili. Kaj ankaŭ ĉi tio, ne antaŭ ol ili trovis en la okuloj unu de la alia, ke oni povas fidi unu la alian. Nur tiam ili sentis, preskaŭ samtempe, ion en la okuloj kaj en la reciproka korpa lingvo, kiun oni ne povis klarigi, ke ili pretis komunigi kaj dividi siajn sekretojn, almenaŭ iujn el ili, kaj eble pliajn poste, se montriĝos ke la fido kiun ili reciprokis, ne estis vana.

Tiel do, en frosta novjorka vintro de decembro, en la jaro antaŭ la Dua Granda Milito, la du renkontiĝis. Itamar Ben Avi<sup>4</sup> kaj Lidja Zamenhof. La kurioza renkontiĝo, kiu neniam okazis inter iliaj patroj, okazas nun - spicita per kontraŭaj ideologioj kaj kun turbulentaj emocioj kiel la magnetiga elektro inter viro kaj virino kiuj estas altiritaj, li al ŝiaj menso kaj koro kaj vizaĝtraĵoj, kaj inverse. Kaj kvankam ili estis nur du, ŝajnis ke ĉiuj kvar ŝvebis en la spaco de la ĉambro.

## Epilogo

Itamar Ben Avi, la unua hebrea infano, kiu fariĝis la simbolo de la nova kaj fiera juda “Sabro”<sup>5</sup>, mortis en 1943 de koratako, en fremda lando, malriĉa kaj kun sento de maltrafo, malproksime de la lando, kiun li tiel amis. En siaj multaj vojaĝoj li renkontis politikistojn kaj intelektulojn, kaj liaj ideoj pri la transskribo de la hebrea lingvo per latinaj literoj, kaj pri la natura maniero, laŭ lia opinio, en kiu judoj kaj araboj povas vivi kune en kantonj en la Lando de Israelo, foje memorigas la ideojn de ŝia patro.

<sup>4</sup> Avi - mallongigo en la hebrea, אבי, signifanta Eliezer Ben-Yehuda.

<sup>5</sup> Indiĝeno, naskita en la lando de Israelo.

Lidja Zamenhof adoptis la bahaan religion kaj disvastigis ĝiajn ideojn en siaj vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo, kune kun la Esperanto-lingvo de sia patro, kaj neniam edziniĝis. Malbonŝance, Lidja revenis al Pollando antaŭ la nazia okupacio. Ŝi estis perforte arestita en la varsovia geto kaj sendita al la ekstermadkampo Treblinka, kie ŝi estis murdita en 1942. Io en la terura sorto-komuneco kun ŝia popolo, elektita por ŝi de la historio, ne povas eviti vekti penson pri la sento de urĝeco de lia patro, promocii la renaskiĝon de la juda popolo en sia lando. La sola atestantino pri ŝia aresto kaj deportado nuntempe loĝas en Tel-Avivo.

Lidja kaj Itamar efektive samtempe troviĝis en en Usono en 1938. Kvin jarojn poste la du ne plu vivis. Laŭ nia scio, ili, kiel iliaj patroj, neniam renkontiĝis.

Yonatan Mizrahi, la kvina generacio de vin-produktanta familio de Givat Ada, estas profesoro pri antropologio kaj informaj sistemoj, kaj estro de la fako de Sociologio kaj Antropologio ĉe la Emek Yezreel Academic College. Lia libro “De la kavernaj pentraĵoj ĝis la inteligenta telefono” estis eldonita pasintjare.

## איתמר ולידיה, פגישה של חורף

תחרות הסיפור הקצר של 'הארץ' לשנת תשע"ח: סיפור מומלץ  
התפרסם במוסף תרבות וספרות של "הארץ", 5.4.2018  
מאת יונתן מזרחי

ניו יורק, דצמבר 1938

מלים. מלים כמו פטישים. פטישים של מלים בשאון שואג, מתכתי, צורם. מכונות שפה מילוליות שלבן עשוי בוכנות של תנועות ועיצורים שהולמים בראשו ללא הרף. ומסביב הכל לבן. קפוא. מרוחק. מנוכר. עמודי ברזל שחורים של פנסי רחוב שניצבים כשורות חיילי בדיל לצד הבתים מאירים את מדרכת השלג באור צהבהב, דלוח, נוגה. מדרכת השלג מחזירה להם ברק חרדלי עמום. ולצדה, מדמנה של מים עכורים שמפולחים פעם אחר פעם בגלגלי הגומי הדקים של כלי רכב חורקים שמזריקים ממנה שובלי רסס של עסיס נוזלי, אפרפר, שמנוני, הניתזים ונחים על המדרכה מכוסת השלג. השלג שכבר מתחיל לקפוא ולהפוך לקרח. השלג שמאבד את התום ואת הרכות המלטפת שהיה אך כמה שעות קודם לכן עם רדתו ארצה ועתה הולך ומתנקד לו ברסס האפור והעכור. והוא הולך, ונעלוי כובשות את השלג ורסס הביבים לעיסה אפרפרה דחוסה, ומשרטט בתוך כך מסלול מסומן היטב של פסיעות כחות, מפוזרות נפש, על פני לוח השלג המלוכלך.

וקר. קור מקפיא חודר, חותך. ואוזניו, אלה ששמעו כל כך הרבה מלים שצלילן חורק, נוקב, אך מלא חיים. אוזניים ששמעו עוד במשכבו בבטן אמו מלים צוהלות גרגרניות של חי' ושל עי' ושל רי' מתגלגלת. האוזניים האלה הופכות עכשיו לזכוכית קריסטל קפואה והן ספק תלויותספק נושרות עכשיו משני צדי ראשו. ודווקא כאן, במקום שבו המלים כה רכות, מתגלגלות, מחליקות, מנומסות, דווקא כאן במקום שהמלים נהגות בקול רפה, רפיון מפנק אוזניים, עד כמה, הוא חושב לעצמו, כל השקט הלבן החורפי הזה רחוק עכשיו מירושלים שלו, הרחוקה, הדהוייה, הדלה, המהבילה והמיזועת. ירושלים היוקדת בקיץ באור בהיר של תכלת עשויה אלומיניום ופלדה. ירושלים של בית, של ריחות חמין בימי

שבת חורפיים ושל פטרוזיליה וקינמון ושל מלבי קר בקיץ הלוהט. וכמה הכל כאן כה רחוק מירושלים שלו.

וכמה רחוק אני עכשיו מהילד שהייתי, עוברת מחשבה לאה בראשו. מהילד שישב כה גאה על דרג הצילום המוגבה, נושא דגל לבן כתוב עברית, "דגל מחנה יהודה מצבא ישראל", ונועל נעל ילדים גבוהה עם שרוכים חומים ועקב קטן ועטור תרבוש טורקי מיניאטורי כפי מידותיו. חנוט בגדי קוזאק רוסי הייתי, הוא נזכר, בגד ליום טוב ששלחו לי כמתנה בקופסה עטופה בעיתונים ישנים שחבוקה הייתה בחבל פריה ירוק ומסולסל. קופסה מעוטרת בולים מארץ רחוקה. סבי וסבת, הורי שתי אימיותי והורירמצילוי של אבי מהעיררה גלובקיה שברוסיה הרחוקה, ארזו את הבגד ובמתנה שלחו אותו אלי, לנכדסגאווותם שגדל בארץ הטרשים הרחוקה. שיעטה עליו מפעם לפעם את אריג הכותנה הרוסית העבה שצווארו מעומלן מתובל בריחה של אמא רוסייה, הם קיוו, וזכור יזכור כך את סביו וסבתו מהארץ הלבנה הגדולה ההיא. ואז בבוקר ההוא בצלמנייה הירושלמית של הצלם שלמה נרינסקי בבית המלאכה Palestine למול הממרייה הצרפתית, כשזיהית, אולי לראשונה בחיי, מתחת לזקן המחודד של אבי אליעזר חיזק חם כמעט ונדיר של גאוה, של נחת, ואולי אף של שניהם גם יחד. כשנוכחתי ברכות המצועפת שבעיניו. רכות של משי מארצות רחוקות שלא ראיתי בו עד אותו הבוקר מעולם. ובעצם, מאז. ואמי החורגת, ביילהחמדה, נשענת על כתפו של אבא והם נראים כמו שניים שלאוסף רגעים בודדים נדמה היה שהתמזגו לכדי מקשה אחת, גוף אחד, נפש אחת אחידה ורוויה ואילו העולם כולו קפא מסביבם.



רק שבעיים לפני כן, באולם הנכנסים הענק של אליס איילנד, עמדה לידיה מרחק כמה פסיעות לצדו, לצווארה מחרוזת עשויה חרוזי עץ עבים, מעט שפופה, אגלי זיעה זעירים מנצנצים על מצחה, בתור המקביל לפקיד ההגירה. האולם הזה היה כעולם ביניים מבדיל בין היעלמות להיטמעות, בין הירקבון לפריחה, בין החיים והמוות. אולם חורף גרולות. שער כניסה או יציאה. שער שיכריע בין אלו שזיכו להתחיל את חייהם מחדש בעולם החדש לבין אלו שיושבו ריקם. שקולס דום, אולי לעד. וכששאל פקיד ההגירה "שם האב", הוא השיב בנימוס, "אליעזר, אליעזר, אליעזר בן יהודה". וכשהיא נשאלה, היא השיבה בקול שרעד קלות, "אליעזר, אליעזר, אליעזר לודוויג זמנהוף". וכשהוא נשאל "שנת הלידה של האב", הוא השיב 1858, והיא השיבה, 1859. ולשאלה "מקום לידת האב", שניהם השיבו, כל אחד

בנפרד, "פולניה גבול בלארוס" ו"בלארוס גבול פולניה". ולשאלת המקצוע של האב, הוא אמר "מחיייה שפות" והיא אמרה "מחבר שפות". והיא שמעה. והוא שמע. והיה ברור שהם ייפגשו שוב. בארץ החדשה.

ושלושה שבועות לפני כן, בים הגדול, במרחב הפתוח שבין הישן והחדש, בין הדרגשים הצפופים העמוסים לאות, וצער ותקוות, וריח קיאה של אנשי יבשה בים סוער מעורב בבשמים של אירופה הזוהרת, ומזוודות ישנות מעור חום, וצעפיפם, ומעילי פרוות שידעו ימים זוהרים יותר, המבט שלהם כבר נפגש, מגשש, תוהה, אולי מייחל, למוצא, לתקווה, לשלווה, לחברות מחבבת, מנחמת. ועכשיו, כשהוא עושה את דרכו על מדרכת השלג מנוקדת האפור בשעת ערב מוקדמת לפגישה שקבעו בבית קפה ניירוקי בלוואר איסט סייד של מנהטן, וכשהיא אוחזת בכוח בפרקי ידיים חיוורות את תיק העור החום הקטן שלה על ברכיה בעודה בוהה במנהרה האפלולית שבה זוחלת הרכבת התחתית כנמייה עיוורת במחילתה, הפגישה שמעולם לא התקיימה בין אבא שלה לאבא שלו קרובה מתמיד.

ובתוך הנמייה הדוהרת, מטולטלים בתנועתה, עמדו האנשים צפופים, וכנופלים הנאחזים בענף בודד תוך נפילתם ממצוק תלוי היו מגששים בידם לאחוז במסעדו של מושב סמוך או במעקה העילי של קרון הרכבת הנגרר קדימה בעל כורחו. ונדמים היו העומדים כהמון אילם שהותך מגברים עטויים בחליפות טויד בצבעי בז' וכחול עמוק ומנשים חנוטות בשמלות עסקים של משי, סאטן ושיפון. ולכולם, כך נדמה היה ללידיה, מבט ריק, משועמם משהו, כמו התיקים הריקים שנשא. אלו שרק בבוקר היו מלאים בהבטחות של סנדוויצ'ים דשנים לארוחת הצהריים ועכשיו היו מיותמים, כמחכים לשאת את כריך המחר. לקראת פגישתה עם איתמר היא חשה כגייזר גדוש ציפיות רגע לפני התפרצותו, בעוד שההמון שסביבה רק ביקש להגיע הביתה, להקשיב לרדיו ולפרוש לשינה. אופני הפלדה של הנמייה שיקשקו בשאון של חריקות מתכת צורמות בתוך שחרכו את הפסים. ההמון במבטו המזוגג ביקש לו לשמוע רק שקט. ולידיה שמעה בנקישות הרך בעשי מוקדמת מנגינות ישנות מוכרות — את צלילי תקתוק מכונת הכתיבה הישנה של אביה בשנותיה הראשונות, עת שזר מלים למשפטים בהקלדות הלילה שלו, שהיו לה "לשירי הערש" של ילדותה כפי שכתבה לימים במכתב לחברה. אביה, בשונה מאביו של איתמר, ראה בשפה תקווה אחרת, שונה בתכלית מזו של האליעזר האחר. אליעזר לדוויג זמנוהוף, אביה של האשה הצעירה שישיבה עכשיו ברכבת, חשב ששפה יכולה להיות גשר לעולם טוב ואוהב יותר בין אנשים ששפתם נבללה בראשית. "אספרנטו" — תקווה — קרא לשפה שטווה כבר כשהיה נער. ולידיה, כמו איתמר, היתה השגרירה ונושאת הבשורה של שפת אביה.

נפתלות הן דרכי ההיסטוריה. אביה שלה ואביו שלו מעולם לא נפגשו. ואף ששניהם היו בני אותו העם והצחירו על עצמם כציונים, ואף שנולדו במרחק שלא עלה על שלוש מאות קילומטר זה מזה ובהפרש של שנה אחת בלבד, ואף ששניהם למדו רפואה ועשו את השפה למרכז חייהם, בחר הגורל שדרכיהם לא תצטלבנה. ואולי לא הגורל הוא שלא הפגישם. אולי ידעו שניהם שדרכם בשפה ובמחשבה כה שונה עד כי לא מצאו מעולם טעם בפגישה כזו. שני האליעזרים — הוריהם — אף לא הזכירו זה את זה כמעט, למעט בדיעה קצרה בעיתון "הצבי" מתאריך 12 בפברואר 1909, שבה המשיל אביו את שפתו המלאכותית של אביה לגולם, "זה שבגופו ובאבריו דומה הוא לילוד אשה ורק דבר קטן חסר בו — כוח החיים!", ואביה, הקוסמופוליט הנחוש שהיה, שהאספרנטו עבורו היתה אך פיגום עשוי לשון לכינונה של תפישת עולם ודת אוניברסלית הומנית חדשה שאותה ייסד — ההומרנסימו — בוודאי לא מצא טעם בניסיון לשכנע את אביו של איתמר, נביא תקומת העם בארצו, מהיר החימה, אדום השיער, מחודד הזקן והמזג, שהעולם יכול וצריך להיות מחודד פחות, ססגוני יותר, ובעיקר חומל. והנה עכשיו הם נפגשים. באמצעות דובריהם, ילדיהם. שני שגרירים נאמנים זמנים קצוב, שרגשותיהם מבלבלים ושמטענם כבד.

ואז הם נפגשו. ולמרות שמעולם לא הכירו ולמרות שלא ידעו האחת על קיומו של האחר, שניהם הרגישו כזוג חברים שיש להם הרבה להשלים, יותר מכפי שאמורים להרגיש שני אנשים הנפגשים לראשונה. בחיי שניהם נמתחו כל כך הרבה קווים מקבילים, כל כך הרבה רגעי סבל וכל כך הרבה הבטחות, כולם שזורים וארוגים יחד ברגעים קטנים של אושר וצער כאחד. שני ילדים קטנים שנהפכו לגדולים כמעט בן רגע, שני ילדים שנשאו כל חייהם מטען כבד וייצוגי מנשוא. מסלול חייהם הותווה כמעט מראש לעיסוק במלים, במשפטים, בפיסקאות — בשפה. ומרחב הבחירה האישי של השניים להתוות את מסלול חייהם, אף שהיה קיים בלבם, הודחק והוסתר עם השנים בשכבות עבות וצפופות של תחבירי נסיבות, של מחויבות, ושל משמעויות. ושתי השפות שיצרו אבותיהם אליעזר ואליעזר למטרות שונות בתכלית, כל כך שונות היו עד כי טוו הן, כדרכן של שפות, מציאות שונות לגמרי עד



שקיומם של השניים נדמה היה כמתקיים כמו בשני עולמות מקבילים, שונים בתכליתם. ויחד עם השוני בצלילים ובחוקי השפות השונות, שאותן נשאו עמם כשליחים במירוץ המכוונים להעביר את הלפיד הלאה — עברית מכאן ואספרנטו מכאן — חלומם וחויית חייהם היו דומים במהות. כך יתברר להם אחר כך. בין כך או בין כך, הסוף הטרגי של שניהם צפוי היה להגיע בחטף מספר שנים קצרות מיום פגישתם הראשונה, בבית הקפה הזה שבו הם יושבים כעת, בניו יורק הקפואה של דצמבר שנת 1938, עשרה חודשים בדיוק לפני פרוץ המלחמה הגדולה השנייה.

בבית הקפה שידע ימים טובים יותר ואנשים שמחים יותר ומוסיקה עולצת יותר הם נפגשו. יושבים שניהם האחד לצד השני בכיסאות עץ שמסעד הידיים שלהם בלה מזוקן ושבעור המשענת והמושב השחורים שלהם נחרכו סדקים לבנים כשערות צדעיים לבנות של מי ששמעו הרבה שיחות בעבר. דבר לא הכין את הכיסאות הללו למה שהם עומדים לשמוע בשעות הקרובות, ובפגישות הבאות. איתמר היה הראשון לדבר. ומכל אלפי המלים ששצפו בראשו, רוצות להתפרץ בבת אחת, כאילו שמלים אינן נתונות למרותו של הרצף הקווי הנגזר מטוריותו של הקול האנושי וממבנה משפט שמבויית ומאולף בחוקים של דקדוק ותחביר, התגנבה לה מפיו מלה אחת, יתומה כמוהו: "יפה". ולידיה חשבה, "ניו יורק". והוא חשב, "את כל כך יפה", אבל את זה הוא לא אזר אומץ להגיד. ואז הוא התעשת פתאום ומיד תיקן את המבוכה הרגעית במשפט הבא שחצה את מחסום שפתיו: "העיר הזו כל כך יפה". והיא שמחה שהבינה למה הוא התכוון, למרות שטעתה. ואחרי עוד כמה משפטי פתיחה מגששים, טכניים כמעט, שעסקו במגז האוויר — היא גדלה במקום קר, הוא במקום חם — במקום שמהם כל אחד מהם הגיע — היא באה מוורשה האצילית והנוצצת והוא מעיר קדושה לעיפה, שהיא גם עתיקה ומרופסת ושכמעט ולא השתנה באלפי שנות קיומה — בכמה אנשי המקום שונים מאלו שהורגלו אליהם — אצלה קרנו האנשים קור מזרח אירופי רווי אדי משקאות חריפים וצלי פסיון ואצלו הם שידרו חום חריף מזרחתיכוני של במיה ברוטב עגבניות וקפה שחור מתוק בספלי קפה זעירים — הם הגיעו סוף סוף לשיחה אמיתית ביניהם. וגם זה, לא לפני שגילו האחת בעיניו של השני שאפשר, אולי, לתת אמון זו בזו. רק אז הם הרגישו שניהם כמעט באחת משהו בעיניים ובשפת הגוף ההדדית שאי אפשר היה להסביר, שהם נכונים לשתף ולחלוק את סודותיהם, לפחות את חלקם ואולי עוד מהם בהמשך, אם יתגלה שהאמון שנתנו זה בזו לא היה לריק.

כך, בחורף ניו יורקי קפוא של דצמבר, בשנה שלפני המלחמה הגדולה השנייה, נפגשו השניים. איתמר בן אבי"י ולידיה זמנהוף. הפגישה המסקרנת שמעולם לא התקיימה בין אבותיהם מתרחשת עתה — למוחה ולליבה ולתווי פניה של זו, ולהפך. ולמרות שרק שניים ישבו, נדמה היה שכל הארבעה מרחפים היו בחלל החדר.

#### אפילוג

איתמר בן אבי"י, הילד העברי הראשון, זה שהיה לסמל הצבר היהודי החדש והגאה, מת בניכר בשנת 1943, בעוני ובתחושת החמצה בהתקף לב, רחוק מנוף המולדת שכה אהב. נסיעותיו הרבות בעולם כללו פגישות עם מדינאים ואנשי רוח, ורעיונותיו ביחס לכתיבת העברית באותיות לטיניות ובדבר הדרך הטבעית בעיניו שבה יכולים לחיות יהודים וערבים יחד (בקנטונים) בארץ ישראל מזכירים לעתים משהו מרעיונותיו של אביה שלה.

לידיה זמנהוף אימצה לעצמה את הדת הבהאית והפיצה את רעיונותיה בנסיעותיה ברחבי העולם לצד שפת האספרנטו של אביה ומעולם לא נישאה. לרוע מזלה, לידיה חזרה לפולין ערב כיבושה בידי הנאצים. היא נאסרה באלימות קשה בגטו ורשה ונשלחה למחנה ההשמדה טרבלינקה, שם נרצחה בשנת 1942. משהו בשותפות הגורל האיומה עם עמה שבחרה עבורה ההיסטוריה אינו יכול שלא לעורר מחשבה על תחושת הדחיפות של אביו שלו לקידום תחייתו של העם היהודי בארצו. עדת הראייה היחידה למאסרה ושילוחה להשמדה מתגוררת כיום בתל אביב.

לידיה ואיתמר אכן שהו בשנת 1938 בארצות הברית. חמש שנים אחר כך השניים כבר לא היו בין החיים. ככל הידוע, הם כאבותיהם, מעולם לא נפגשו.

---

יונתן מזרחי, דור חמישי למשפחת כורמים מגבעת עדה, הוא פרופסור לאנתרופולוגיה ומערכות מידע וראש החוג לסוציולוגיה ואנתרופולוגיה במכללה האקדמית עמק יזרעאל. ספרו "מציורי המערות לטלפון החכם" יצא לאור בשנה שעברה.

# Min trafis feliĉ' esti rusa poeto... parto II

Poetoj juddevenaj en la rusa poezio de la 20-a jarcento

**Mikaelo Bronŝtejn, Rusio**

*La unua parto aperis en IE n-ro 161.*

*Mi estas elektinta nur kelkajn poetojn arbitre, do tiujn, kiujn plej ŝatas mi mem. Kaj mi estos tre kontenta, se ankaŭ vi ekŝatos ilin pere de miaj tradukoj. Por tiuj, kiuj ŝatus legi pli multajn poemojn mi donu referencon al la libro, samnoma kun tiu ĉi artikolo: "Min trafis feliĉ' esti rusa poeto...", eldonita de eldonejo Impeto, en Moskvo 2012 [http://impeto.trovu.com/rusa\\_poeto](http://impeto.trovu.com/rusa_poeto)*

## **Eduard Bagrickij (1895 – 1934)**

Eduard Grigorjeviĉ Bagrickij (Dzjubin) naskiĝis en Odeso.

La knabo el filistra juda familio frekventis reallernejon<sup>6</sup> kaj poste ricevis profesion de termezuristo en specialaj kursoj.

Ekde 1915 li, estante membro de junularaj literaturaj societoj, komencis publikigi siajn poemojn en loka gazetaro. La poemoj estis pimpaj, imitantaj tradician ampeozion.

La romantika karaktero gvidis la junulon al aktiva interveno en la Civilan Militon, kaj ekde 1918 ĝis 1920 li partoprenis sangajn batalojn kiel ano de partizana taĉmento en la Suda Ukrainio. Ĝuste tiuj bataljaroj edukis lin, donis inspiron kaj temaron por posta verkado. En 1920 Bagrickij eklaboris en JugROSTA (Sudrusia telegrafagentejo), verkante alvokajn kaj agitajn poemojn, ofte irante al la fronto kun agittraĵoj. En tiuj jaroj li verkis pri sia ŝatata heroo Till Eulenpigel, pri la militiroj de Garibaldi, pri la Pariza Komunumo sed pli kaj pli multe kaj profunde – pri siaj personaj travivaĵoj.

Ekde 1925 la poeto forlasis la hejmurbon kaj ekloĝis en Kuncovo, apud Moskvo, verkante por diversaj ĉefurbaj gazetoj. En 1926 aperis lia plej fama granda poemo "Balado pri Opanas", montranta la tragediajn eventojn de la Civilmilito en Ukrainio. Jam ege famiĝinta kiel poeto, en 1928 li eldonis la unuan poemaron "Sud-Okcidento". Poste, en 1932, aperis du liaj poemaroj "La venkintoj" kaj "La lasta nokto", kie Bagrickij poezie analizas sian propran vivon kaj la vivon de la sovetia lando.

<sup>6</sup> Reallernejo diference de klasika gimnazio orientigis la lernantojn ne al universitata, sed al metia kleriĝo

Dum la lastaj jaroj la poeton turmentadis grava malsano – ftizo, kaj en februaro 1934 li forpasis en Moskvo. Lian lastan vojon – al la tombejo – akompanis kavaleria regimento kaj milita orkestro.

Spertulo, li provis esti instruanto por la junaj poetoj. En 1929 en populara literatura revuo “Oktobro” li publikigis alvokan artikolon: “... Nun estas kreata nova tipo de poeto – la poeto – scienculo, la poeto – sociemulo. Ni, poetoj, devas batali por primareco de nia arto. Ni devas radike rekonstrui la opinion pri poeto-bohemulo. Ekde ni devas eki la nova tradicio.”

Eble, estas bonŝanco, ke Bagrickij ne ĝisvivis postajn kruelajn jarojn. Stalin trovis lian instruon tro burĝeca, do, certe, la poeto estus subigita al la reprezalioj. Tion tamen suferis liaj poemoj – malgraŭ sia sovetieco kaj patriotismo ili iĝis malpermesataj por jardekoj kaj reaperis publikitaj nur post morto de Stalin.

Lia filo Vsevolod ankaŭ sukcesis iĝi konata poeto en Sovetio. Li foriris al la Patria Milito kaj pereis batale en 1942, en la aĝo de dudek jaroj.

### ***La birdkaptanto***

*Malfacilas birdkaptado:*

*Studu la kutimojn birdajn,  
Tempon de l' migrad' memoru,  
Spertu fajfi, kiel bird'.*

*Sed, vagante laŭ la vojoj,  
Noktumante ĉe l' baraĵoj,  
Didel gajas, Didel kantas  
Kaj kaptadas birdojn plu.*

*En sambuk', humida, ronda,  
Fifre frapis najtingalo,  
En pinar' paruoj tintas,  
Fringo fajffas sur betul'.*

*Kaj eligas sperte Didel  
El mistera sak' logilojn  
Tri – kaj ĉiun el la birdoj  
Honorigas per logil'.*

*Agas per logil' sambuka,  
Tintas la logil' sambuka, –  
El azilo la sambuka  
Tuj respondas najtingal'.*

*Prenas li logilon pinan,  
Fajfas la logilo pina, –  
Sur la pin' tintilojn ŝutas  
La paruoj por respond'.*

*Kaj eligas poste Didel'  
El mistera sia sako  
La logilon plej facilan,  
Plej sonorán – el betul'.*

*Li karese ĝin kontrolas,  
Kantan fendon blovpurigas, –  
Laŭtavoĉe la betulo  
Kantas tuj pro lia spir'.*

*Kaj, aŭdinte tiun voĉon  
De la arbo kaj de l'birdo,  
Fringo sur betul' ĉevoja  
Reciprokas per faifad'.*

*Trans la voj' ekstervilaĝa,  
Kie mutas ĉara bruo,  
Ĉe laĝet' lemnokovrita  
Didel metis retojn nun.*

*Kaj la mondo – verda sube,  
Blua kaj helblua supre,  
Antaŭ lin birdege venas  
Kun fajfado kaj tintad'.*

*Tiel paŝas gaja Didel  
Kun bastono, bird' kaj sako  
Tra l'arbarkovrita Harco  
Laŭ dekliva rejna bord'.*

*Laŭ la kverka Turingio,  
Laŭ la pina Saksa lando,  
Laŭ sambuka Vestfalia,  
Laŭ lupola Bavari'.*

*Marta, Marta, ĉu vi ploru,  
Se en kampo paŝas Didel',  
Se al birdoj Didel' fajffas  
Kaj ridetas sen kial'?*  
1918

### **Samuil Marŝak (1887 – 1964)**

Samuil Jakovleviĉ Marŝak naskiĝis en Voroneĵ. Lia patro, Jakov estis majstro kaj inventisto, havanta oficon en la ĥemia uzino. La familia nomo estas hebrelingva mallongigo (מֵרַאשׁ"ק) de la frazo “Nia instruisto, rabeno Aaron Ŝmuel Kajdanover”. Tiun nomon de la fama talmudisto (1624-1676) ricevis ĉiuj liaj posteuloj.

Jam en dekkvinjara aĝo la talenta knabo verkis poemojn kaj tradukis el la latina. En 1902 pri lia estonta literatura sorto ekzorgis Gorkij kaj fama rusa kritikisto Stasov. La unua poemkolekto de Marŝak kun nomo “Cionidoj” aperis en 1907. Tie li traktis la judajn temojn; unu poemo estis dediĉita al forpaso de Teodoro Herzl.

Ekde 1912 ĝis 1914 Marŝak kun sia novelzino loĝis en Britio. Li studis en politekniko, poste en londona universitato, intertempe multe vojaĝante en la lando kaj kolektante popolajn baladojn kaj poemojn. Tiujn li komencis traduki; ĝuste tiuj tradukoj poste famigis lin.

Dum la militaj jaroj Marŝak estis prizorganto de rifuĝintaj infanoj, kiuj trafis al Voroneĵ. Ekde tiam startis lia kariero de porinfana poeto; poemoj, fabeloj, teatraĵoj kaj kantetoj por infanoj iĝis lia ĉefokupo. Tiuj ĉi liaj verkoj estas ĝis nun ŝatataj de la rusa infanaro.

La dua metio, famiginta la poeton, estis la tradukarto. Dank' al liaj brilaj tradukoj, ĉefe el la angla, la rusoj konatiĝis kun la sonetoj de Ŝekspiro, kun la

poemoj de Burns, Blake, Wordsworth, Keats, Milne, kun la anglaj kaj skotaj baladoj. Pro la meritoj en tiu branĉo Marŝak estis nomumita *honora civitano de Skotlando*.

En la tridekaj jaroj Marŝak fondis en Leningrado la unuan eldonejon de porinfana literaturo. En 1937 la eldonejo estis likvidita kaj la plej brilaj disĉiploj de Marŝak estis reprezaliitaj aŭ senlaborigitaj. Versimile, lin mem savis la politika satiro, kiun li aktive verkadis tiutempe, vipante “burgĝojn, imperiistojn, ekspluatantojn de la laboristaro” kune kun la fama karikaturista triopo Kukriniksi. La saman ĝenron Marŝak praktikis kontraŭ la nazioj dum la Dua Mondmilito, publikante satirajn poemojn en sovetia gazetaro. Dum la militaj jaroj li direktis gravajn monsumojn por helpi la judajn infanojn, suferintajn de Holokaŭsto kaj transloĝigataj al Palestino.

Krom la porinfana kaj tradukita poezio, dum kvindek jaroj Marŝak estis verkanta ankaŭ seriozajn lirikajn poemojn por plenaĝuloj kaj artikolojn pri la problemoj de poezia tradukarto. La lastaj estis kunigitaj en la libro “Edukado per la vorto”, kiu iĝis perfekta lernilo por tradukemuloj.

Li estis, verŝajne, la sola el inter la juddevenaj poetoj, enorme dorlotita de la registaro, kaj ricevinta multajn ordenojn kaj medalojn, kvar (!) Stalinajn kaj unu Leninan Premion, kio estis la plej alta distingo en la lando. Uzante sian aŭtoritaton, li sukcesis grave protektadi Brodskij kaj Solĵenicin, persekutatajn de la ŝtato.

Forpasinta en julio 1964, Samuil Marŝak estas enterigita en la plej prestiĝa moskva tombejo Novodeviĉje.

### ***Tri donacoj***

- *Jen, do por vi ses pingloj,  
ho mia belulin'!  
Mi pri la edziniĝo  
humile petas vin.  
Por danco mi invitos  
nur vin, nur vin, nur vin,  
kaj estos mia vi edzin'!*
  
- *Ses pingloj, do, sinjoro?  
Aĥ, kia abomen'!  
Ses pinglojn, do, sinjoro,  
vi lasu por vi mem.  
Invitu por la danco  
ne min, ne min, ne min –*

*ne estos via mi edzin'!*

- *Jen, do por vi tintilo,  
kristala sonoril'.  
Servistojn veku nokte  
per ties laŭta tril'.  
Por danco mi invitos  
nur vin, nur vin, nur vin,  
kaj estos mia vi edzin'!*
  
- *Kristalan tintileton  
mi ne akceptas tuj!  
La stultan tintileton  
forĵetu al rubuj'!  
Invitu por la danco  
ne min, ne min, ne min –  
ne estos via mi edzin'!*
  
- *Jen, do por vi ringeto,  
donac' modesta nur –  
ringeto diamanta  
kun ujo el velur'.  
Por danco mi invitos  
nur vin, nur vin, nur vin,  
kaj estos mia vi edzin'!*
  
- *Mi ŝatas la ringeton  
kun diamanta pur'.  
Mi prenas la ringeton  
kaj ujon el velur'.  
Permesas mi inviti  
por danco min, jes – min,  
kaj pretas esti la edzin'...*
  
- *Ses pinglojn mi alportis  
por la unua foj',  
kaj pro l'rifuzo via  
foriris en malĝoj'.  
Kristalan tintileton  
alportis poste mi –*

*vi vere min plorigis  
per via ironi'.  
Jen fine – la ringeto –  
de mia amo spur'.  
Akceptis vi l'ringeton  
kun ujo el velur'.  
Vi pretas edziniĝi  
al mi en fin', en fin' –  
sed nun jam mi ne prenas vin!*

## **Boris Pasternak (1890 – 1960)**

Boris Leonidoviĉ Pasternak naskiĝis en Moskvo, en la familio de rafinitaj intelektuloj. Lia patro estis fama pentristo, ilustrinto de Tolstoj-verkoj, la patrino famiĝis kiel elstara pianistino. La arto ĉirkaŭis la knabon ekde la naskiĝo, kaj lia unua forta hobbio, dank' al influo de la ofta gasto en lia hejmo, fama komponisto Skrjabin, estis muziko. Ekde dektrijara aĝo Boris verkis muzikaĵojn, studis teorion de komponado, sed, ses jarojn poste, forlasis la muzikon definitive.

Ĉe alveno de la gimnazia aĝo li ne estis akceptita en la unuan klason pro la fifama procento por la judoj, sed post unu jaro direktoro de la gimnazio invitis lin tuj en la duan klason. Boris studis en la gimnazio, poste en la histori-filologia fakultato de Moskva Universitato, filozofio iĝis lia dua granda hobbio. Tamen en 1913 li forlasis la filozofion, samkiel antaŭe – la muzikon, kaj finfine elektis okupon por la tuta vivo – la poezion.

La unua poemkolekto “Ĝemelo en nuboj” estis eldonita en 1914. Sekvis pluraj libroj, inter kiuj la poemaro “Fratin' mia – vivo” famigis lin kaj levis en la vicon de elstaraj rusaj poetoj.

En 1921 gepatroj kaj fratinoj de Boris Pasternak formigris el Sovetio kaj ekloĝis en Berlino. Tiu fakto komence neniom malhelpis la restinton esti ŝatata de la sovetiaj aŭtoritatoj. Li aktive partoprenis agadon de la verkista unio de USSR kaj eĉ faris paroladon en ties unua kongreso. Nikolaj Buĥarin, la bolŝevika aŭtoritato, poste ekzekutita de Stalin, ĝuste en tiu kongreso pledis ke Pasternak estas la plej bona soveta poeto. Dum kelkaj jaroj la granda unuvoluma verkaro de Pasternak estis reeldonata ĉiujare. En 1935 la poeto eĉ reprezentis Sovetion en la verkista porpaca kongreso en Parizo, sed tio estis lia lasta vojaĝo eksterlanden. Ekde 1936 la rilatoj inter la regantoj kaj la poeto iĝis pli malvarmaj. Li estis kritikata kaj akuzata pri “foriro de la reala vivo”. La novajn poemojn oni rifuzis publikigi, kaj Pasternak ekokupiĝis pri tradukado. Ankaŭ en tiu literatura branĉo riveliĝis lia eksterordinara talento – la tradukoj el Shakespeare, Goethe, Schiller iĝis klasikaj.



En la jaroj de la Dua Mondmilito Boris Pasternak senpere ĉeestis batalagojn ĉe la fronto. Rezulte li verkis aron da raportoj kaj poemoj pri la soldata milita vivo.

Dum dek jaroj Pasternak estis kreanta sian kronan verkon, romanon “Doktor’ Ĵivago”. Sed la redaktoroj de literaturaj revuoj en Sovetio akre kritikis la romanon kaj rifuzis publikigi ĝin. “Doktor’ Ĵivago” aperis en 1958 en Italio; tiu publikigo lanĉis militiron kontraŭ la aŭtoro en Sovetio. Li estis forpelita el la verkista unio, la gazetaro akre mokadis kaj damnadis lin, moskva filio de la verkista unio eĉ pledis, ke Pasternak estu senigita je sovetia civitaneco kaj forpelita el la lando. “Doktor’ Ĵivago” estis publikigita en Sovetunio nur en 1988. Dum kelkaj jaroj sinsekve Boris Pasternak estis kandidato por Nobelpremio, kaj en 1958 la Nobela komitato fine atribuis ĝin al li. Tiu fakto provokis eĉ pli kruelajn atakojn kontraŭ la verkisto. Per senvuala premado la aŭtoritatoj devigis lin rezigni de la premio. La diplomo kaj medalo estis enmanigitaj al lia filo en 1989.

En 1960 Boris Pasternak mortis pro kancero de pulmo.

### ***Hamleto***

*Haltis bru’. Mi venis sur podion.*

*Mi, apogstaranta ĉe kardin’,*

*En reeĥa sono kaptas tion,*

*Kio en la viv’ atendas min.*

*Min celante l’nokto ektenebras*

*Nun per mil binokloj en lini’.*

*Aba Patro, ĉe vi ĉio eblas, –*

*La kalikon portu for de mi.*

*Vian planon prenas mi kun amo*

*Kaj konsentas mi pri mia rol’,*

*Sed ludatas nun alia dramo,*

*Do senigu min je la parol’.*

*Sed ne eblas l’ordon preterlasi,*

*Kaj ne eviteblas vojoĥin’.*

*L’vicon pasi – ne la kampon pasi.*

*Farisea mar’ ĉirkaŭas min.*

1946

### **David Samojlov (1920 – 1990)**

David Samojlov (David Samuiloviĉ Kaufman) naskiĝis en Moskvo, en inteligenta kuracista familio. En 1938 li iĝis studento de fama IFLI (Instituto de filozofio, literaturo kaj arto). Tie li estis studanta ĝis la junia invado de la nazioj en 1941, kiam li volontule foriris al la milito.

Ĝis la fino de la Mondmilito Samojlov estis en armeo, batalante dekomence kiel mitralisto, poste kiel ĉefo de militesplorista plotono. Li havis bonŝancon resti viva, ricevinte gravajn vundojn, ankaŭ multajn medalojn kaj ordenon por la kuraĝa batalado.

Post la milito Samojlov daŭrigis sian studadon jam en la Literatura Instituto. Lia unua poemaro estis eldonita en 1958, kiam li estis matura 38-jara viro. La poemaro restis ne tro alte taksita de la legantoj kaj de la kritikistoj; pro la tarda komenco neniu aŭguris gloron al la poeto.

Sed dum la sekvantaj dudek jaroj Samojlov kreis aron da poemoj-primilitaj, lirikaj, ŝercaj, filozofaj – kiuj iĝis vera trezoro de la rusa poezio. Nobelpremiito Brodskij diris, ke la primilitan poezion de Samojlov li aprezas multe pli ol tiun de aliaj, eĉ tre famaj samtempuloj-poetoj. Dum tiu periodo estis eldonitaj sep poemaroj de David Samojlov.

Li okupiĝis ankaŭ pri tradukarto, postlasinte bonegajn tradukojn el Rambeaud, Apollinaire, Lorca, Brecht, Nezval, Tuvim, Eminescu. Krom tio estis verkitaj eseoj pri la versfarado, unuigitaj grandparte en lia “Libro pri la rusa rimo”.

En 1988 David Samojlov estis honorigita per la Ŝtata Premio de USSR.

Ekde 1975 li loĝis en Estonio. Tie, tuj post sia parolado en la jubilea vespero, omaĝe al Pasternak, la 23-an de februaro 1990 lin trafis subita morto.

La poemoj de David Samojlov estas tradukitaj al multaj eŭropaj lingvoj kaj eldonitaj en kelkaj landoj. Multajn poemojn – la plej elokventajn kaj belajn – poste uzis por siaj kantoj kelkaj famaj rusaj bardoj-kantistoj. Bulat Okuĝava en la kanto, kreita omaĝe al David Samojlov, diris:

*Jes, ni penadis, sed tamen ĉu taŭgos ĝi,  
nia penado por ĉiu epok'?*

Dume, post jardekoj, ankoraŭ ĝi taŭgas.

*Min trafis feliĉ' esti rusa poeto.*

*Min trafis honor' tuŝi l'venkojn en preto.*

*Min trafis naskiĝ' en la plaga momento,*

*En jar; malbenita, en damna jarcento.*

*Do trafis min ĉio. Elfalis kun miro  
Mi, kvazaŭ ebria, dum la militiro.  
Nun kuŝas mi, kvazaŭ feltboto en kavo.  
Benit' de Rusio sen ajna bonhavo.*

*Nomoj de la vintroj  
La nomon havas ĉiu vintr'.  
Natalja estis la unua.  
Mister', glimado, frisko blua  
Ĉeestis do en ŝia sin'.*

*Vintr'-Katerina estis jam,  
Jelena estis. Estis Marfa.  
Kaj mi en vintra temp' longdaŭra  
Frenezis pro la nova am'.*

## ***Se mi ne estus hebreo... Kelkaj notoj pri la rilatoj inter Hebreismo kaj Esperanto***

**Davide Astori**

---

**Resumo.** *En la kontribuaĵo (elprenita el: D. Astori, Esperantaĵoj. Dek ses itineroj esperantologi-interlingvistike, FEI, Milano 2014, p. 51-56) estas prezentita la hebreeco de la iniciatoro de la lingvo internacia, esplorante kiom de lia nacia aparteno influis la projekton esperantan.*

*Por pliprofundigoj kaj specife rilata literaturo v.: D. Astori, "Se non fossi ebreo ... Qualche nota per una riflessione sul rapporto fra ebraismo ed Esperanto", enkonduko al la itala traduko de: L.Ch. Zaleski-Zamenhof, Via Zamenhof, Giuntina Editrice, Firenze 2009 [La Zamenhof-strato, Varpas, Kaunas 2003], p. 5-10; "Zamenhof, Nimrod kaj la universala lingvo", en Homarane 2 (2013), p. 97-105.*

Se ne eblas resumi sur malmulte da paĝoj la historion de la rilatoj kaj de la interligitecoj inter la Esperanto-Movado, precipe dum ĝia plej frua fazo (tiu kiun la parolantoj nomas *praesperanto*) kaj la Hebreismo, multe plifaciligas la taskon la deklaro pri la konscio de la iniciatinto de la internacia lingvo registrita dum la intervjuo kiun li donis al Isidore Harris (*Jewish Chronicle*, 16.07.1907):

Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo.



Familia domo zamenhofa en Bjalistoko

La malfeliĉon de la homara disiĝo neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo el la geto. La neceson de lingvo sennacia, neŭtrale homa neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en lingvo de popolo kiu lin forpuŝas, havas samsuferanojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi.

Naskiĝis la 15-an de decembro 1859 Lejser Zamenhof, filo de Mordechai, nepo de Fajvel, filo de sia tempo, en iu malgranda Bjalistoko kiu vidis, okaze de popolnombrado en 1895, 76%-n de la civitanoj apartenantaj al la hebrea popolo (en Rusujo kie, en 1879, vivis pli ol 5 milionoj da hebreoj): hebreo malkvieta, puŝegita inter la iluminisma revo de asimiliĝo (kiu estos, en lia kazo, provo de *antaŭtempa* globaligo) kaj en la sama tempo kvazaŭ profeto de tiu mallonga jarcento kiu, post malmulte da tempo, estos frakasanta tiun esperon je renovigo kaj estonto por la hebrea popolo, “*tutunue*” kaj por la tuta civilizita mondo.

Zamenhof sentis profunde la hebrean problemon. Tiel bone sintezas tian partoprenon Federiko Gobbo (“La filosofia morale di Ludwik Lejzer Zamenhof per il nuovo millennio” [“La filozofio morala de Ludwik Lejzer Zamenhof por la nova jarmilo”]), en <http://erewhon.ticonuno.it/primavera2005/zamenhof.htm>):

Tamen kio estas la hebreismo? Kial la hebreoj suferas ekde jarmiloj? Estis tiuj ĉi la demandoj, kiujn sekvis la intelektuloj aŝkenazaj post la pogromo en Ukraino de la 1881-a jaro. Ene de la klubo *Chibat Zion*, la respondoj estis tre malsamaj. Aĥad-Haam, verkisto de la epoko, vidis la esencon de la hebreeco en iu “nacia moralo”, kiu ekzistas ankaŭ ekster la religio; David Neumark respondis: en la monoteismo; Shimon Bernfeld diris: ‘en la nacia moralo’; Berdichevski kaj Shaj Ish Hurvich neis la ekziston de iu ajn esenco. Zamenhof respondis nur post multe da tempo, en 1905, per iu letero al la amiko Javal: “La vera esenco de la hebrea popolo estas la religia ideo pri unu sola Dio ne pensita profunde por la tuta komunumo. Pro tiu ĉi ideo Moseo kreis la hebrean popolon, pro ĝi la hebreoj suferis laŭlonge de la miljaroj, pro tio ili vivas eterne, kvankam ĉiuj aliaj popoloj kiuj vivis samtempe kun ili jam mortis. La perfekteco de tiu ĉi ideo sekve estas la misio tute natura de la hebreoj kaj de ilia *ekzistomotivo*”. La respondo de Zamenhof estas do simila al tiu de David Neumark: la monoteismo. Kaj en la Talmudo Zamenhof lokalizas en Hilel la veran esencon de la monoteismo (*Shabbat* 31a). [el itala originalo]

Lia rilato kun la cionista movado estas kontraŭata. En 1881, je lia reveno el Varsovio post la specialiĝo pri oftalmologio en Moskvo, li estas tre ligata al ĝi: li kunlaboras kun la hebrea revuo *Russkij Jevrej* kaj fondas la unuan cionistan klubon de la urbo, *Chibat Zion*; en *Razsvet* la 22-an de januaro 1882, sub la kaŝnomo Gamzefon, tute apude de la fiaj “leĝoj de majo” je la nomo de Nicholas Pavlovich Ignatiev, li demandas *Ĉto zhe nakonetz delat?* (“Kion fari do?”); en 1884, la entuziasmo por la cionismo ekmalvarmiĝas: en 1895-96 li komencas disvolvi – post la ideo de iu universala lingvo – tiun de *ponto-religio*, ĝis en 1897, kiam li rifuzas partopreni en la movado de Herzl, skribante pri tio, en la letero al la amiko Michaux de la 21-a de februaro 1905:

Post 3-4 jaroj de energia laborado por la cionismo mi venis al la konvinko, ke tiu ĉi ideo kondukos al nenia celo, kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la koro ĝi restis por ĉiam kara, kiel agrabla sed neplenumbla revo; kiam en 1897 naskiĝis la granda cionista movado aranĝita de Herzl, mi jam ne povis aliĝi al ĝi.

Li restas de tiam en silento dum pluraj jaroj, ĝis la 19-an de januaro 1901 (denove li kaŝas sin sub pseŭdonimo, *Homo sum*) li eldonas en Varsovio libreton en la rusa lingvo kun la titolo *Gillelizm. Proekt reŝenija evrejskogo voprosa* (“Hilelismo. Projekto pri la solvo de la hebrea demando”), verkita jam en 1897 kiel publikaĵo privata al la geamikoj, “al malgranda nombro da inteligentaj hebreoj”, por uzi la vortojn de la aŭtoro. De tiu ĉi verko, kiu sole meritis unu tutan publikadon, ni transskribas la komencon de la teksto, simptome pri la sento de Zamenhof, kiam li ekis redakti la libron:

Legantoj hebreoj! En la nomo de estonteco de dekmiliona amaso de niaj fratoj, ĉie pelataj kaj malestimataj, suferantaj jam tiel multajn jarcentojn kaj verŝajne kondamnitaj ankoraŭ al pluaj suferoj sen ia antaŭvidita fino, ni permesas al ni turni nin al vi kun propono, por kiu ni petas vian bonvolan atenton. Sed ni atentigas vin pri tio, ke vi ekaŭdos de ni vortojn novajn, al kiuj viaj oreloj ankoraŭ ne alikutimiĝis. [...] Cionistoj en la unua minuto, eble, fermos siajn orelojn por niaj vortoj, opiniante, ke ni ankoraŭ ne sufiĉe maturiĝis en la hebrea patriotismo por kompreni la tutan signifon de cionismo, tial ni devas rimarkigi, ke ni mem iam apartenis al la plej ardaĵoj cionistoj kaj ni estis



tiaj jam en tiu tempo, kiam plimulto de la nunaj cionistoj ankoraŭ staris tute fore de tiu ĉi movado; kaj ni rezignis tiun ĉi ideon ne pro nesufiĉa amo al ĝi, sed nur pro nerefuteblaj pruvoj de racio, kiuj definitive konvinkis nin, ke cionismo estas nur alloga frukto de nesufiĉa kompreno de la esenco de la hebrea demando [...].

En tiu ĉi kunteksto naskiĝas la revo (pli bone dirite, la espero) esperantista: unue ĝuste kiel solvo de la hebrea problemo, poste kiel donaco al la mondo. La ideo kontribui al la bonfarto de la homaro pere de iu komuna lingvo, anoncanto de komuna kulturo sur la bazo de renovigita paco universala (tutmonda), estas fundamente noaeca.

En 1906, en la februara numero de *Ruslanda Esperantisto*, Zamenhof

proponas anstataŭi la nomon *Hilelismo* per tiu de *homaranismo*, abandonante tiamaniere la *Hilelison* kiel ‘demando hebrea’; ĝis sia kompleta disiĝo, kiam en 1914 li respondas negative al la invito partopreni en la fondado de la *Tutmonda Ligo de la Judaj Esperantistoj*:



Zamenhof kun sia filo Adam, 1911

Bedaŭrinde mi mem devas meti min flanken de tiu ĉi problemo, ĉar laŭ miaj konvinkoj mi estas ‘homarano’, kaj mi ne povas ligi min je celoj kaj idealoj de iu *gens* (etno) aparta aŭ de iu religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu naciismo prezentas por la homaro nur la plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celo de ĉiu homo devus esti: krei iun harmonian homaron. Estas vere ke la naciismo de supremataj popoloj – kiel reago de natura memdefendo – estas multe pli pardonebla ol la naciismo de la popoloj supremantaj, tamen, se la naciismo de la fortuloj estas malnobla, la naciismo de la malfortuloj estas malprudenta: ambaŭ naskiĝas kaj subtenas unu la alian kaj kaŭzas eraran rondon de malfeliĉo, el kiu la homaro neniam povos eliri, se ĉiu el ni ne donas la

amon kiun li/ŝi nutras por sia propra homgrupo kaj li/ŝi ne havos grandan penon fari tion starante sur grundo komplete neŭtrala.

La timo damaĝi sian revon pro la antisemitismo ĉiam pli rampanta portos lin al profunda interna dramo kiun li esprimas tiel en letero verkita en 1905 al Michaux, preparante la Unuan Kongreson de Esperanto en Boulogne-sur-Mer:

Mi estas hebreo, kaj ĉiuj miaj idealoj, ilia naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataloj internaj kaj eksteraj – ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco. Mi neniam kaŝas mian hebreecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo, kies tuta historia misio konsistas, laŭ mia opinio, en la unuigo de la nacioj en la celado al “unu Dio”, t.e. unuj idealoj por la tuta homaro; sed en la nuna tempo de la naciaj ŝovinismoj kaj tre vastiĝinta antisemitismo, fari el mia hebreeco temon por publika parolado estus neoportune [...] Kaj paroli pli detale pri mia vivo kaj pri la historio de miaj ideoj sen konstanta ripetado pri mia hebreeco estas preskaŭ neeble. Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniuj povas senti tiel forte, kiel hebreo el la geto. La necescon de lingvo sennacia, neŭtrale homa neniuj povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en lingvo de popolo kiu lin forpuŝas, havas samsuferanojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi. [...] Mia hebreeco estis la ĉefa motivo, pro kiu mi ekde la plej frua infanaĝo dediĉis min komplete al iu sola ideo kaj al iu sola revo – al revo de la unuigo de la homaro.

Drama konsciiĝo, kiu kunpartigita de la tuta movado ekde la originoj, resonas en la sekva prikonsidero de Javal en letero de la posta 5-a de oktobro:

Mi legis pli ol 700 artikolojn pri Esperanto, aperintaj post Boulogne. Nur unu asertas ke d-ro Zamenhof estas hebreo. Ni bezonis tre mirindan disciplinon por kaŝi al la publiko vian originon.



Hodiaŭ, post tiom da tempo, vivas ankoraŭ la ideo de Esperanto: je 150 jaroj de sia naskiĝo, en 2009 la urbo de Zamenhof celebris lin gastigante la Universalan Kongreson, kaj por paroli pri li estos, inter la aliaj, la nepo Louis C. Zaleski-Zamenhof. Ankaŭ pere de tiu ĉi artikoleto, *mi-dor le-dor*, de generacio al generacio, kiel en la antikva spirito, plutenante vivanta kaj vivigante la historion, en tiu *salsèlet*, kiu faris ankaŭ el la hebreisimo – kiel diros en alia formo pri Zamenhof Vitaliano Lamberti (*Una voce per il mondo. Lejzer Zamenhof il creatore dell'Esperanto*, Mursia, 1991) – “voĉon por la mondo”. Tiel esprimis sin Louis Christophe dum la inaŭguro, la pasintan 15-an de decembro, de la jaro dediĉita de UNESCO al la avo.

La jaro de Zamenhof estas la centkvindeka de la naskiĝo de mia avo, Ludoviko Lazaro. Mi insistas pri la vorto “naskiĝo” en la senco de “vivo”. Ĉar tio signifas, ke Li estas ankoraŭ vivanta, almenaŭ virtuale, vivanta en niaj koroj, danke al Liaj idealoj, daŭre aktualaj. Tiel la idealo de toleremo, respekto de la aliulo, de la malsamulo je haŭtkoloro, je religio, je kulturo kaj je lingvo. Li bone konsciis, ke el la diverseco, el la multeco de malsamaj kulturoj konsistas la granda riĉeco de la homaro, riĉeco kiu devas esti konservata sen iu ajn risko. Tamen Li estis ankaŭ ege konscia pri la fakto, ke por eviti, ke el tiu ĉi diverseco naskiĝu malamikeco, necesas liveri al la malsamaj socioj ilon de ebla komunikado: iun lingvon neŭtralan, iun lingvon duan por ĉiuj, iun lingvon kiu ne celas anstataŭi la gepatrajn lingvojn. [...] Finfine kia estas Doktoro Esperanto: ĉu pola, litova, rusa aŭ ankoraŭ hebrea? Cetere en Hispanujo Li portas la medajlon de Isabella la Katolika, en Francujo Li estas Kavaliro de Honora Legiono, kaj multaj monumentoj starigitaj je Lia honoro, stratoj kaj placoj dissemataj en dekoj da landoj de la mondo portas Lian nomon. Li mem donis la respondon: Li estas unu *homarano*, t. e. apartenanto al la tuta homaro. Tiu kiu ĝojas kiam falas la miljaraj muroj inter la popoloj, dividitaj, disfaligo kiun Li kantis en Siaj profetaj poeziaĵoj. Tiu kiu ĝojas vidi la popolojn, antaŭe malamikajn, kontribui por formi grandan *rondon familian* en la tuta Eŭropo kaj baldaŭ en la tuta mondo. Nun al tiu ĉi homa familio mankas nur neŭtrala instrumento de komunikado, respektoplena je la naciaj lingvoj kiuj estas la vehiklo de la malsamaj kulturaj riĉecoj: mankas iu *lingvo internacia* kiu ne volas anstataŭi ilin. Ni esperu je iu pli rapida

superado de tia vakuo. Ni esperu: la espero fakte estas la simbolo de nia Esperanto. L.L.

Revo, eble, utopio. Aŭ nur bezono. Plaĉas al ni pensi, ke ne hazarde la movado universaligis la pseŭdonimon de la kreinto por difini la lingvon mem, kaj ne hazarde la himno kiu sonas ekde 1905 dum ĉiu esperantista renkontiĝo havas la titolon “*La Espero*”, *la espero, ha-tikvah. Spes ultima dea*, Espero, la lasta diino, en mondo, kiu ekde tiam ne ŝajnas esti farinta multajn paŝojn antaŭen.

Pri la aŭtoro:

**Davide Astori**, magistrecio pri Beletro je klasika orientiĝo, doktoreco pri romanidaj lingvoj (LMU–Munkeno), diplomo pri paleografio (Ŝtata Arkivo de Parmo), ĵurnalisto, estas, ekde 2015, asociita profesoro pri ‘Ĝenerala Lingvistiko’ kaj ‘Sanskrito’ ĉe la Universitato de la Studoj de Parmo (Italio). Inter liaj ĉefaj interesoj substrekindas: kontakto inter lingvoj kaj kulturoj, semidaj lingvoj, tradukscienco, lingvoj kaj mondkonceptoj, lingvaj kaj sociaj minoritatoj, sociolingvistikaj aspektoj de naciaj identecoj.



Specife pri la *lingvo internacia* li nombras pli ol 30 publikaĵojn. Ekde 1999 li prelegis multfoje en fakaj konferencoj kaj komunikadoj en Italujo kaj eksterlande. Jam konsiliano de IEJ (enjuneco) kaj poste estrarano (kaj vicprezidanto) de FEI, li estas la organizanto de la Premio “Canuto” por la plej bona doktora disertacio pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temaroj (ĉijare estis la VIII eldono), kaj li sekvis dum la lastaj jaroj, kiel referanto, doktorigajn tezojn pri temoj rilataj al interlingvistiko kaj Esperantologio.

Kun la eseo “La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per Esperanto kaj Homaranismo” li gajnis la (unan) Premion “Luigi Minnaja” de la Belartaj Konkursoj de UEA 2011 (la prelego estas aŭdebla ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=stW8V1AZ-VM>).

# Persona Angulo: Mikaelo Lineckij

*Fine de aŭgusto-2017 el Ukrainio en Israelon por konstante loĝi venis sperta esperantisto Mikaelo Lineckij.*

## Jen estas skizo de mia E-vivo

Mi estas esperantisto ekde aprilo 1969. En 1973 mi iniciatis kaj fondis en mia urbo – ĉefurbo de Ukrainio Kievo (Kijivo) la E-klubon “Ora pordego”. En 1986 – iniciatis kaj fondis la klubon KARE (Kijiva Arta Rondo Esperantista). En 2009-2010 mi estis prezidanto de Ukraina Esperanto-Asocio, en la 2016 – vic-prezidanto.

Dum 48 jaroj de aktivado mi estis inicianto, organizanto aŭ kunorganizanto de multaj E-renkontiĝoj: OkSEJT7-21 en 1979, OkSEJT-24 en 1982, InterSEJT-2 en 1990, LER (Lernejana E-Renkontiĝo) en 1991, KLERo (Kijiva Lingva E-Renkontiĝo) en 1998, REJo (Renkontiĝo de E-Junularo)-1, -2, -3 en 2002 - 2004, Festivalo de kulturoj en 2005, Komerca seminario “Via sano kaj sano de via monujo” en 2006, IJK (Internacia Junulara Kongreso)-67 en 2011, Kongreso de blindaj esperantistoj en 2012.

Mi estis aktiva partoprenanto kaj kunorganizanto de E-renkontiĝoj en iama Sovetio: en Ukrainio, Armenio, Litovio, Bjelorusio, Rusio; ankaŭ en Pollando, Slovakio, Ĉeĥio, Hungario, Germanio, Svedio, Francio.

En tri SEJT-oj, pro la aktiveco mi estis elektita kiel “Mister Esperanto”: en 1978, 1979 kaj 1986.

Ekde 1970 mi konstante instruis E-kursojn.

De 1993 ĝis 2010 mi estis la sola oficiala instruisto de Esperanto en Ukrainio kaj en kijiva liceo N 38. Kun la liceanoj dum tiu periodo mi partoprenis en pli ol 20 E-renkontiĝoj.

Mi ĉiam strebis al tio, ke Esperanto fariĝu socie utila. En 2002 mi iniciatis kaj fondis Societon por subteno kaj defendo de ukraina kulturo “ЕЦІЕРО”, en kiu Esperanto estas la dua laborlingvo. La nocion



<sup>7</sup> OkSEJT – Okcidentsovetia Somera Esperanta Junulara Tendaro

“subteno” necesas kompreni tiel, ke pere de Esperanto en E-renkontiĝoj estis subtenata kaj disvastigata ukrainaj kulturo kaj lingvo, kiu estas nedisigebla parto de la kulturo. “Defendo” signifas strebi kontraŭstari troan uzon de la angla en Ukrainio. Grava atingo de la Societo estas studia registro de kompakt-diskoj “*Ukrainaj kantoj en Esperanto*”, en kiu estas registritaj 20 ukrainaj popolaj kantoj kaj “*Arkeo de Noa*” – 20 kantoj de 20 popoloj.

Krome mi sukcesis produkti diskon kun 22 kantoj far Paŭlo Moĵajev “*Pluke – traduke*”. Tiuj kantoj estas plukitaj, tradukitaj, kantataj kaj akompanataj de la plej juna membro de la Akademio de Esperanto.

Mi komencis instrui la lingvon en 1970 kaj ĉiam strebis bonigi la instru-procedon. Do, krom la diskoj mi kompilis kaj produktis diversajn instru-helpilojn:

1. *Loto* – “*Objektoj*” (taŭgas por 2-a aŭ 3-a leciono: en ĝi estas uzitaj 48 slipoj kun nomoj de la objektoj kaj la bildetoj).

2. *Loto* – “*Bestoj kaj bestetoj*” (tre bone uzatas post dono de participaj formoj – 48 slipoj kun la konvenaj frazoj kaj bildetoj).

3. Dialoga ludo “*Kvarteto*” (uzatas fine de la kurso, kiam la lernantoj plene konatiĝis kun la gramatiko). Nun haveblas du specoj de la ludo: “*Bestoj*” kaj “*Floroj*”. Tiu ludo bone taŭgas ankaŭ por vigligi la klubkunsidojn.

4. Por la kursfinintoj estas tre utila legolibro “*Mamutido Miĉjo*”, verkita de fama rusia esperantisto M.Bronŝtejn.

5. “*Ni dialogu*” kun didaktikaj demandoj-respondoj post ĉiu dialogo (estas farita surbaze de “*Amuzaj dialogoj*” de A.Lienhard kaj modernigita de M.Lineckij). Por la kursfinintoj kaj progresantoj – ege utila materialo por ellerni bone paroli en Esperanto.

6. “*Ne tiel, sed tiel ĉi*” de F.Faŭhaber – libreto por perfektigi kaj ellabori bonan stilon ĉe uzado de Esperanto.

7. “*Homa saĝo*” – kompilaĵo da diverspopolaj sentencoj, selektitaj kaj tradukitaj de M.Lineckij.

8. “*Ĉu la mondo suferas pro afazio?*” de C.Piron. Lingva situacio per okuloj de profesia psikologo.

9. “*Pensoj de niaj gravuloj*” – prelegoj de W.Auld kaj C.Piron

10. “*Psikologia rezisto kontraŭ Internacia lingvo*” analiza prelego de C.Piron.

Estas nun preparataj ankoraŭ kelkaj broŝuroj kun prelegoj de C.Piron.

11. Haveblas ankaŭ *sonlibro* “*Fabeloj de H.C.Andersen*” kun la *teksta broŝuro* kun 3 fabeloj, voĉigitaj far modela elparolo de S.Marček
12. Por ioma amuziĝo estas preparitaj 6 volumetoj da anekdotoj “*Ridetu ankaŭ vi...*” (Tradukoj de M.Lineckij).

## ELI Gratulas

---

Al Amri kaj Gila Wandel, pro la geedziĝo de ilia filino Maja, kun la fianĉo Maor, en Aprilo 2017. La geedziĝon, kiu okazis unu semajnon post la Israela Kongreso, partoprenis pluraj s-anoj, inter ili ankaŭ eksterlanda gasto: Mikaelo Bronŝtejn, kiu restis en Israelo speciale tiucele.



## Mikaelo Giŝpling, 1924-2017

La 26-an de septembro, 93-jara, s-ro Giŝpling forpasis en Jerusalemo, Israelo, post kelkmonata sufero pro kancero. Naskiĝinta en Irkutsk, Rusio, li iĝis kemi-inĝeniero. Pri Esperanto li ekaŭdis kiel 13-jarulo, sed ĝuste tiam, en 1937, Sovetio pasis la Grandan Purigon, kaj E-on li memlernis poioime nur post sia malmobilizo en 1943 ĝis la Monda Junulara Festivalo en Moskvo, 1957; en la posta jaro oni elektis lin kiel prezidanton de la moskva junulara E-grupo *Fajrero*. Tamen meze de la 1960-aj jaroj li forlasis E-on, reaktiviĝante, kiel ... poeto komence de la 1990-aj: dum ankoraŭ en Moskvo aperis lia unua poemaro *El Sisma Zono* (1994). Post lia enmigro en Israelon en 1998 aperis ankoraŭ tri: *Eola Harpo* (1999), *Tie Ĉi Tie* (2003) kaj (enhavanta ankaŭ tradukojn) *Vespere* (2008). Giŝpling estis kvinfoje premiita ĉe Belartaj Konkursoj pri poezio: 1-a premio en 2000, 2004, 2008; 2-a kaj Honora mencio en 2004. Ekde 2000 li estis FD pri poezio en Jerusalemo.

### Forpaso

#### Mikaelo Giŝpling (1924 – 2017)

La 26-an de septembro, 93-jara, s-ro Giŝpling forpasis en Jerusalemo, Israelo, post kelkmonata sufero pro kancero. Naskiĝinta en Irkutsk, Rusio, li iĝis kemi-inĝeniero. Pri Esperanto li ekaŭdis kiel 13-jarulo, sed ĝuste tiam, en 1937, Sovetio travivis la Grandan Purigon, kaj E-on li memlernis poioime nur

post sia malmobilizo en 1943 ĝis la Monda Junulara Festivalo en Moskvo, 1957; en la posta jaro oni elektis lin kiel prezidanton de la moskva junulara E-grupo *Fajrero*. Tamen meze de la 1960-aj jaroj li forlasis E-on, reaktiviĝante, kiel ... poeto komence de la 1990-aj: dum ankoraŭ en Moskvo, aperis lia unua poemaro *El Sisma Zono* (1994). Post lia enmigro en Israelon en 1998 aperis ankoraŭ tri: *Eola Harpo* (1999), *Tie Ĉi Tie* (2003) kaj (en-

vanta ankaŭ tradukojn) *Vespere* (2008). Giŝpling estis kvinfoje premiita ĉe Belartaj Konkursoj pri poezio: 1-a premio en 2000, 2004, 2008; 2-a kaj Honora mencio en 2004. Ekde 2000 li estis FD pri poezio en Jerusalemo.



Nekrologo pri Mikaelo Giŝpling en revuo Esperanto, novembro 2017

## Aleksander Kerbel, 1930-2017

La 10-an de junio, 86-jara, s-ro Kerbel forpasis en Hajfa, Israelo, kelkajn tagojn post cerboinfarkto. Naskiĝinta en Kievo, Ukrainio, li iĝis elektroteknikisto; lerninte E-on en 1966, li tuj ekaktivis en la kieva movado.

Ankaŭ post la enmigro en Israelon en 1975 li daŭrigis sian agadon etendante ĝin sur la literaturan kampon. Lia ĉefverko iĝis la tri-voluma "Esperanto per 501 vortoj" – rektametoda lernilo per legado de 3 re-rakontitaj romanoj. Krome li verkis kaj komponis kantojn, sed plejparte elrusigadis prozaĵojn: humurajn romanojn far Ilja Ilf kaj Evgenij Petrov, sciencfikciajn romanojn far Arkadij kaj Boris Strugackij kaj plurajn aliajn. Fakdelegito pri stenografio (1982-2015), li iĝis delegito de Hajfa ĝis sia forpaso.



## Liana Elaŝvili, 1955 – 2017

S-ino Elaŝvili, delegito de Bat-Jam, Israelo, kaj fakdelegito pri ĵurnalismo kaj kartvela lingvo ekde 2003, forpasis la 29-an de junio, apenaŭ tri monatojn post la subita malkovro de cerba kancero. Naskiĝinta en Tbilisi ŝi esperantistiĝis en 1970 kaj apud sia profesia laboro instruadis E-on. Post la enmigro en Israelon en 1991 ŝi daŭrigis sian ĵurnalismen per la kartvela kaj ekaktivis en la Tel-Aviva E-Klubo.



## Hans-Dieter Platz (HDP), 1943 – 2018

HDP naskiĝis en St. Martin, Germanio, kaj forpasis la 20-an de aprilo. esperantistiĝis en la 60-aj jaroj. Li estis kasisto de Germana E-Junularo. Famiĝis en Esperantujo kiel ĉefo de la Internacia Festivalo (IF), kiun li iniciatis kaj organizadis en la jaroj 1979-2015. Kvankam ne membro de ELI, HDP estis granda simpatianto, kiel videblas ekzemple en la memorlibro pri Josi Ŝemer (p.82-86). En la IF partoprenis pluraj israelaj s-anoj, i.a. Amri, Gila, Josi Ŝemer, Esti Saban kaj ŝiaj fratinoj. En la 30-a IF (2013/14) HDP nomis du salonojn nome de la tiam forpasintaj Josi Ŝemer kaj Esti Saban.



HDP kun Gila kaj la fratinoj kaj nevino de Esti en la silvestra balo, 2013/14

# La 20-a Israela Kongreso de Esperanto

Eilat 11-13.4. 2019

La Kunveno de MONA

(Komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko de UEA)

Akaba 13-15.4.2019



ELI kaj MONA/UEA invitas al komuna evento en 11-15.4.2019 en Israelo kaj Jordanio, en la najbaraj Eilat kaj Akaba ĉe la Ruĝa Maro.

Ĉeftemo: kultura heredaĵo, ekologio kaj konekzisto en la Mezoriento  
Riĉa muzika programo: **Kajto**

Postkongresa ekskursaro kun profesia ĉiĉeronado en Esperanto: Jordanio (16-18.4), Jeriko, Morta Maro kaj Masado (19-20.4) Jerusalemo (21-22.4), Hajfa, Akko, Nazareto kaj Tiberiado (23-25.5), Tel Avivo (26.4).  
Eblas parte partopreni.



Informoj kaj aliĝo:  
<http://www.esperanto.org.il/IK20-MONA>

**כינוס האספרנטו המדרח-תיכוני באילת ובעקבה**

**مؤتمر الشرق الأوسط للاسبرانتو في إيلات والعقبة**